
# HORIZONTO

II-a JARO N-o 7 (1)
JANUARO - FEBRUARO 1977

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



«LA PELVOARBO»
Jean Arp.

DEAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTISMO

TRI OPTIMISTAJ POEMOJ

UNU LARMO PRO LA HOMARO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

# HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Fernando de Diego
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.° Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.° 1 – Januaro – Februaro 1977


ENHAVO


IDEAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTISMO (Ivo Lapenna)
POST 90 JAROJ... LA "ESPERANTOFONIO", ĈU MITO AŬ REALAĴO? (Jean Thierry)
SKULPTISTO, JEAN ARP (H. V. Rasmussen)
VORTOJ DE PROF. HAL KOCH (trad. H.V.R.)
LA ANTAŬJUĜOJ (Jean Thierry)
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED) Redaktas (Ivo Lapenna)
BELETRO
Tri Optimistaj Poemoj (G. Waringhien)
Soneto al Poeto (A. Koba)
Majstro Ulrik kaj Henriette (trad. E kaj B. Golden)
Unu Larmo pro la Homaro (trad. LIVENDEK)
En la Koncentrejo (J. Devis Calpe)
LA INTERNACIA LINGVO EN GRAVA SCIENCA KONFERENCO Raportas (Ivo Lapenna)
EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAĴOJ
Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)
KION VI NE LEGOS ALILOKE
Letero al Prezidanto de UEA (F. Munniksma)
MALLONGE
TRA LA ESPERANTO-GAZETARO


## KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo (Jarabono 500 Ptoj.), aŭ la sekvantaj.

## PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 12 Elmer Close, ENFIELD Middx. EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Bikuben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono: 60,— D Kr.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave., NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro. 040-753362-40, Nacia Banko de Greklando Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Hungario:
Tibor Szabadi, Pf. 66, H-8800 NAGYKANIZSA. Jarabono: 180,— Ft.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 70 izr. liroj.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— $.

Luksemburgo:
Albert Wickler, 17 rue St. Laurent, LORENTZWEILER. Konto N.° 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380,— luksemburgaj frankoj.

Nederlando:
Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat, 172, HAGO 2011, Poŝtkonto 162626. Jarabono: 25 Gld.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

# IDEAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTISMO

La sukcesinta partipolitika konspiro en UEA, pli ol abunde dokumentita en *Hamburgo en Retrospektivo* (baldaŭ aperos la dua, kompletigita, eldono) kaj plu pruvata per nekontesteblaj faktoj en *Horizonto*, perdigis al la Asocio ĝian laŭstatutan neŭtralecon kaj necese rezultigis ĝian plej seriozan kompromitiĝon interne de la Esperanto-Movado kaj en la ekstera mondo. Ŝiavice, tio kaŭzis — kaj ne povis ne kaŭzi — multajn konektitajn flankefikojn kaj profundan krizon el ĉiuj vidpunktoj: forlaso de elementaj etikaj principoj, terura falo de la intelekta nivelo (vidu, ekzemple, la enhavon de *Esperanto* kaj de similaj periodaĵoj), malobservoj de la Statuto, ĉesigo de bone organizitaj antaŭaj agadoj, foresto de kia ajn perspektiva laborplano, apertaj atakoj kontraŭ la Fundamenton kaj subfosado de la Akademio de Esperanto, paralela ekfloro de kontraŭscienca kaj tial danĝera "planlingvismo", rapida malsupreniro de la pene atingita prestiĝo kaj de UEA kaj de la lingvo mem kaj, neeviteble, apatio en la vicoj de ordinaraj esperantistoj, kio psikologie estas mortiga por batalanta kultura movado. Analizante la posthamburgan situacion en *Literatura Foiro* de junio/aŭgusto 1976, Giorgio Silfer skribis, ke «... la senalternativa velko de la Montevidea spirito estas tumoro pli maligna ol la ĉiuokaze respektinda demando 'kiamaniere plane financi la Movadon?'». Kaj oni nun ne misprezentu lian diron per aserto, ke "li nomis *siajn kontrŭulojn tumoroj*", kiel oni mensoge kaj pli ol malice disfamigas jam preskaŭ tri jarojn, ke mia diro "abscesoj sur la organismo de UEA" en la Aprila Artikolo (*Esperanto*, n-ro 4/1974) rilatis ne al faktoj kaj fenomenoj, sed al personoj. En ĉiu okazo, la "abscesoj sur la organismo de UEA" jam fariĝis, laŭ G. Silfer, tumoroj, eĉ "malignaj tumoroj".

Estas malfacile diri kiu el tiuj negativaj aspektoj estas la plej danĝera kaj tial, samtempe, la plej doloriga por ĉiu sincera esperantisto. Prenitaj kune — kaj ili ja estas nedisigeble kunligitaj — ili estas katastrofaj por la Esperanto-Movado kaj povus eĉ fariĝi fatalaj por la estonteco de la lingvo mem.

## DU ĈEFTEMOJ

Kiel oni povas legi aliloke en tiu ĉi n-ro, la Organiza Komitato de la Tria Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado elektis du ĉeftemojn. Ili rilatas al du gravaj, verŝajne la plej senteblaj aspektoj de la nuna krizo unu ekstera, la alia interna.

Saĝe planita, la pritrakto de la lingva problemo en Eŭropo kiel la plej brulanta parto de la tuta problemaro en mondaj kadroj, okazos ne abstrakte, sed realece, kun konsidero al la eŭropa kultura fono kaj al la nuntempaj centripetaj kaj centrifugaj tendencoj en la procezo de la eŭropa integriĝado.

Evidente, la Organiza Komitato opiniis, ke la etika aspekto urĝe postulas specialan atenton kaj tial decidis, ke la alia ĉeftemo estos "Ideaj Aspektoj de la Esperantismo en la Lumo de la Aktuala Krizo de la Esperanto-Movado". Dum unu tuta tago la konferencanoj havos la eblecon priparoli la demandon laŭ etikaj kaj sociologiaj kriterioj, harmoniigi la starpunktojn kaj formuli la gvidliniojn por la estonta agado de la neŭtrala Esperanto-Movado en tiu sfero.

La elekto de tiu ĉeftemo estas forte aprobinda, ĉar precipe la humaneca internaciismo kaj la aliaj ideaj aspektoj de la esperantismo suferas la plej grandajn batojn. Ĝuste tial necesas diri jam nun, komence de la 90-jara datreveno de Esperanto, kelkajn vortojn pri la etika krizo.

## LA ETIKA KRIZO

Ne nur la specifaj etikaj valoroj de humaneco, kiujn Zamenhof ligis al la Internacia Lingvo, sed ankaŭ la multe pli vastaj, fakte la elementaj moralaj principoj de vero kaj intelekta honesteco, rekonitaj ĉie almenaŭ en la mondo de kulturo, plu estas piedpremataj. Eĉ se oni lasas flanke la kvanton kaj karakteron de senprecedencaj ofendoj kaj kalumnioj kontraŭ personoj — kaj tiun hontindan makulon oni devas neniam forgesi — restas vastega "nepersona" sfero, en kiu nun jubilas kaj malvero kaj blufo. Al tiu sfero apartenas, interalie, la klopodoj nei, aŭ eĉ neniigi, la tutan neŭtralan Esperanto-Movadon ankaŭ ekster UEA per misprezentoj, prisilentoj, cenzuro kaj similaj rimedoj, jam bone elprovitaj en totalecaj, nedemokrataj reĝimoj. Ekzemple, oni sisteme disfamigas, ke la neŭtrala Esperanto-Movado estas "tiel nomata", aŭ ke ĝi estas "konkurenca organizaĵo, fondita de la eksprezidanto de UEA", aŭ "inspirita" nur de mi, k.s. La vero, feliĉe,

estas, ke la neŭtrala Esperanto-Movado ne estas "t.n.", sed ekzistas sen kiu ajn "t.n." ekde 1887; ke ĝin inspiris Zamenhof, Hodler, Privat kaj multaj aliaj, inkluzive min mem, pri kio mi povas nur fieri; ke ekde 1908 ĝis la mezo de 1974 UEA estis ĝia reprezenta organizaĵo; ke ekde Hamburgo ĝi tute ne estas internacie organizita, sed ja esprimiĝas internacie tra *Horizonto*, per siaj internaciaj konferencoj, kaj plu vivas ĉie en la mondo. Fakte, ĉiuj unuopuloj, grupoj kaj organizaĵoj, kiuj en sia laboro por Esperanto agas konforme al la principo de partipolitika neŭtraleco, en la nuna UEA ne plu observata, apartenas al la neŭtrala Esperanto-Movado. La *Deklaro de Principoj*, akceptita de la Unua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-movado en 1975, formulis tiun bazan principon jene:

«El ĉiuj projektoj de komuna lingvo nur Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta komunaĵo. Tiu komunaĵo havas la moralan devon konservi ekster ĉiu ajn ideologio la neŭtrale homan karakteron de la Zamenhofa Esperanto kaj de la humaneca internaciismo esence ligita al ĝi.»

## ZAMEMHOFA KONCEPTO

Tiu konciza formulo plene respondas al la zamenhofa koncepto de la Internacia Lingvo kaj de ĝia idea flanko, science nepre ĝusta, sen kiu la projekto neniam estus transformiĝinta en vivantan lingvon. Parolante pri la etikaj valoroj de la esperantismo, Zamenhof diris en 1906: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan". Ni estas multe malpli striktaj kaj firme diras: "Kun tia organizaĵo, kiu forĵetas la bazajn etikajn valorojn de la esperantismo kaj la fundamentajn homajn rajtojn kontraŭe al sia propra Statuto por ebligi senbridan agadon de partipolitikaj fortoj, ni volas havi nenion komunan". Ne nur pro principaj kaŭzoj, sed ankaŭ tial, ĉar ni estas konvinkitaj, ke nenio nobla povas esti konstruita sur malvero kaj sur piedpremo de aliaj etikaj valoroj, nek io solida sur blufo.

Tamen, se, malgraŭ la taksoj bazitaj sur sciencaj analizoj, iam montriĝos, ke eĉ Esperanto mem, tute senigita de humaneca internaciismo, servas nur al difinita partipolitika doktrino kaj por partipolitikaj luktoj, ni ne hezitos ripeti la vortojn de Zamenhof en la sama parolado de 1906: "Ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto..." (*Originala Verkaro*, p. 372).

Espereble, neniam necesos tion fari. Kreskanta nombro da esperantistoj konsciiĝas kaj agas konforme al la principo de neŭtraleco. Pluraj tre elstaraj, kiuj, ŝokitaj pro tiu tuta pli ol bedaŭrinda afero, ne plu volis aŭdi eĉ la vorton "Esperanto", nun revenas kaj aktiviĝas. Al tio multe kontribuis *Horizonto*, kiu en nuraj kelkaj monatoj sukcesis fariĝi la plej prestiĝa kultura kaj informa periodaĵo. Necesas plu subtenadi ĝin, diskonigadi ĝian enhavon, vastigadi la reton de kunlaborantoj, daŭre havigadi al ĝi novajn abonantojn. Nur la plua prosperado de tiu "laŭtparolilo de sendependa neŭtraleco kaj sentinelo de ties principoj", kiel skribis la direktorino en la 1-a n-ro, povos, eble, kaŭzi, ke ankaŭ UEA iam retrovu sin mem.

——oOOo——

Intertempe, bonege progresas la preparlaboroj por la Tria Konferenco. Ili aŭguras brilan internacian renkontiĝon kun eksterordinare grava labora programo, diskutota en amika atmosfero, kaj kun tre interesaj kulturaj aranĝoj.

Al la invito de la Organiza Komitato, konsistanta el harditaj aktivuloj, mi volonte aldonas mian personan alvokon al la iamaj multjaraj kunlaborantoj, al multnombraj helpantoj en la konstruado de la moderna ĝishamburga UEA, kaj al ĉiuj aliaj subtenantoj de la zamenhofa esperantismo:

*Aliĝu tuj al la Tria Konferenco kaj kontribuu al ĝia laboro. Eĉ se vi ne povos ĉeesti, tamen, se iel eble, almenaŭ aliĝu por montri vian apogon al la celoj kaj idealoj de la neŭtrale homa esperantismo.*

*Ivo Lapenna*

Cele al la primovadaj diskutoj en la 3-a Konferenco de N.E.M. (HORIZONTO, n.° 6, p. 129)

# POST 90 JAROJ...

# LA "ESPERANTOFONIO", ĈU MITO AŬ REALAĴO?

Jam de dekkelke da jaroj oni kutimas en Francio nomi "frankofonio" la tutan aron da homoj, kiuj pli malpli uzas la francan lingvon tra la mondo (kaj ĉiu el ili estas sekve frankofonia).

Kompreneble en la unuaj jaroj, kiuj sekvis 1887, la maloftaj geesperantistoj lernantaj la lingvon sentis la bezonon grupiĝi interne de asocioj plej ofte lokaj kaj poste per federacio estigi tiun amasan aron, kiun oni kutime nomis la "movado".

Sed de post 1887 multaj estis la okazintaj kursoj, la efektivaj lernintoj; kaj nun estas tiel malfacile determini la nombron da homoj, kiuj iom ĉie tra la mondo lernis kaj kapablas uzi la lingvon flue se ne ĉiutage, kiel ekzemple la nombron de tiuj, kiuj lernis la stenografion.

Ĉi-rilate prof. Pierre Janton en sia verketo ("Que sais-je?" p. 112) faras jenan takson: "*En 1966 propono favora al Esperanto demetita de la Universala Esperanto-Asocio en la oficejo de UNo kolektis 920.954 individuajn subskribojn krom tiuj de 3843 organizajoj reprezentantaj sumon superan al 71 milionoj da aliĝantoj. Se oni akceptas, ke unu dekono de la 72 milionoj rekte aŭ nerekte interesitaj pri tiu peticio povas esti esperantista, la cifero de 7 milionoj estus transpasita; se oni retenas nur la dudekonon, ĝi restus supera al 3,5 milionoj, kaj la kvardekono alproksimiĝus al du milionoj. Ŝajnas neverŝajna, ke en tiu vasta movado favora al Esperanto nur iu tiel malforta proporcio (2,5%) de la koncernitaj homoj estas kapabla uzi la lingvon*". Kaj fakte pluraj taksoprovoj kalkulitaj de lingvistoj (kiel tiu de Mario Pei en Usono) fiksas inter 4 kaj 7 milionoj la mezan nombron de la homoj almenaŭ scipovantaj kompreni la Lingvon Internacian.

Kiom ajn estas la geesperantistoj — interne de asocioj aŭ certe ankoraŭ multe pli ekstere de ili — la tuto konsistigas hodiaŭ ian veran soci-komunaĵon, la esperantofonian komunaĵon tutmondan, kiu kvankam disigita al ĉiuj anguloj de la mondo, same kiel estas ekzemple la izraela diasporo — ne tial estas malpli vivanta; kion ja atestas la jenaj faktoj.

——oOOo——

Ĉu efektive ĉi tiu komunaĵo ne posedas plurecon da asocioj kaj gazetoj plej diversaj: lokaj kaj regionaj, naciaj kaj internaciaj, profesiaj kaj religiaj, propagandaj kaj ideologiaj? Eĉ la tendenco multobligi specialigitajn asociojn pli kaj pli akcentiĝas: se kvar el ili datiĝas jam de la komenco kaj tri pliaj de la intermilita periodo, ja pli ol du dekoj formiĝis ekde 1945! Kaj ĝuste tion substrekas prof. Pierre Janton (en jam citita verko): "*Dume la propagando estas nur duagrada aspekto de kultura aktiveco, kiu konsistas en akcepto de la konsekvencoj ideologiaj, psikologiaj kaj sociologiaj rezultantaj el la fakta stato kreita de pluraj generacioj da esperantistoj: kiam centoj de miloj da individuoj lingve, kulture, rase kaj reĝime malsamaj libervole elektas paroli saman lingvon, unu nova komunaĵo ekestas, ia "esperantista popolo" dotita per specifaj celo kaj personeco, kiu konsistigas defion al la jarcenta organiziteco de la homaro. Tiu komunaĵo jam estis sufiĉe firmiĝinta, por ke la XX-jarcentaj diktatoroj juĝu utila malpermesi ĝin sur la plej granda vasteco de la Malnova Mondo*". Ĝi estas nun eĉ tiel grave disvastiĝinta, ke jam de pli ol dudek jaroj ĝi fariĝis vasta forumo por politikaj propagandoj; kaj asocioj eĉ kulturaj estis trafitaj de imperiismaj avidecoj. Tiel do oni povas diri, ke en 1977 la Esperanto-Mondo efektive eliĝis el la tro strikta kadro de la asocioj, kaj se ĉi tiuj restas konsiderindaj faktoroj, ilia influo efikas tamen en plurisma stato kaj kontraŭas al la totalisma hegemonio de unu sola el ili.

Ĉu efektive ĉi tiu komunaĵo ne posedas ja ekster la asocioj radiofoniajn elsendojn po du fojoj en la semajno kiel tiuj de Romo, aŭ eĉ ĉiutagajn kiel tiuj de Varsovio? Hodiaŭ dudeko da stacioj elsendas el pli ol dek kvin landoj tiel malsamaj kiel Pekino el Ĉinio kaj Muritiba el Brazilo, Stoke-on-Trent el Britio kaj Valencia el Hispanio. Kaj ĉiuj tiuj elsendoj same kiel gazetoj aŭ revuoj kiel "Heroldo de Esperanto" aŭ "Horizonto", "El Popola Ĉinio" aŭ "Norda Prismo", certe ne dependas de la asocioj.

Ĉu efektive la komunaĵo nun ne prezentas originalajn beletraĵojn, kies eldonejoj plej ofte ne estas asociaj? Same estas cetere pri kanzon-diskoj kaj ankaŭ kulturaj centroj kiel Kastelo Grésillon aŭ La Chaux-de-Fonds! La literaturo per sia historio, siaj periodoj, periodaĵoj kaj skoloj atestas nuntempe vivon plene sendependan de tiu aŭ alia asocio; ĉiu el la periodoj stampas iun gravan paŝon en la evoluo mem de la lingvo: — la unua per provoj kaj ekzercoj sin nutris el la lingvoj de granda civilizacio; — la dua per teoriaj reserĉoj precizigis la nuancojn de la lingvoesprimiloj; — fine la tria per la nuntempaj frumaturaĵoj kapabligas la lingvon iam naski la genian verkon, kiu sukcesos imponi al la mondo kaj altrudi la lingvon. Kiel skribis d-ro L. L. Zamenhof, "*Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon apud la literaturo kaj ne anstataŭ la literaturo*".

Unuvorte, ĉio ĉi konfirmas, ke se la Esperantofonio komence estas nur lingvo-projekto, ĝi fariĝis nun vera socio, ĉar kiu parolas pri lingvo, tiu jam ekparolas pri socio;

kaj kiu parolas pri socio, tiu ja fine parolas pri homaj valoroj, alidire pri kulturo. Cetere la graveco de tiaj internaciaj socio kaj kulturo tute ne eskapis el la avideco de la komunistaj imperiismoj, kiel atestas la evento de 1974 en la Komitato de UEA!

——oOOo——

Jen do la esperantofonio estas kulturo!

Efektive — ĉu ĝin oni bondeziras aŭ ne — la teknika progreso estas nerefutebla fakto, kiu nepre kondukas al tio, kion la iama direktoro de Unesko René Maheu nomis "*la civilizo de la universala*". Kaj spite tion estas strange konstati, ke — kvankam ĉe la fino de la XX-a jarcento preskaŭ ĉiuj jarcentaj tabuoj forfalis, eĉ tiuj de la seksaj aferoj! — restas nur unu, kiu rezistas: tiu de la lingvoj. Tial klariĝas, ke Esperanto, viktimo de plej diversaj ostracismoj (Stalino, Hitlero, Tojo, Salazar, inter aliaj) ankoraŭ nun restas la granda miskonata kaj misestimata sub la efiko de kalumnioj, aprioraĵoj kaj antaŭjuĝoj.

Plivole ol akcepti la eblecon de komuna lingvo, la futurologoj preferas eĉ antaŭvidi teruran mondon, en kiu rivalus je superregado kvin lingvoblokoj: tiu de la angla-usona lingvaĵo jam duobliĝonta, la ĉina malantaŭ siaj bambuoj, la rusa interne de la "ferkurteno", la hispana apartigita en Sud-Ameriko, kaj la franca en la malmulta spacorestaĵo, gravege trafita de "frangla" ĵargono kaj "heksagona" degenerado! Ja en 1945 Winston Churchill jam deklaris: "*La morgaŭaj imperioj estos tiuj de la lingvo kaj spirito*"; kaj tiuj kvin lingvoblokoj sin retrovas nun reunuiĝintaj nur por malavare pruntedoni al la esperantismo siajn proprajn halucinojn de "unuformigado" kaj "superregado".

Nu la vera vizaĝo de esperantismo estas ĝuste tiu kulturo, kiu esprimiĝas jam de 90 jaroj en literaturo esence kaj aŭtentike internacia: ĝi naskas ian humanismon en la plena vorto-senco, kiu igas ĉiun uzanton de la lingvo komprenema pri la valoro — ho! kiom neanstataŭigebla por la kultura riĉeco! — de la propraĵo de la homoj kaj gentoj, sen ke pro tio li rezignu pri la idealo de l' latina poeto Terencio:

"*Mi estas homo: homa al mi nenio fremdas.*"

En tempo kiam la socio demandas sin pri siaj strukturoj, kaj la gentoj pri la karakterizaĵoj de siaj etikoj kaj kulturoj, granda estas por unuj la tento, por la aliaj la altrudo, kiuj instigas ilin senĉese retroiri en ian universon koncentrejo-socialan propran al la primitivaj tribuoj. Kaj la vera vizaĝo de esperantismo jen estas humanismo advokanta, ke ĝuste la homo ne povas esti modle "unu-dimensia" aŭ "unuformata", kaj la sola rimedo antaŭgardi lian apartan propraĵon ekestas per la "*defendo kaj ilustrado*" de ĉiuj idiomoj; kio supozigas per si mem unu "koina-n" lingvon forigantan en la komunikado ĉian gento-lingvan hegemonion.

——oOOo——

Unuvorte, esperantismo estas humanismo, ĉar ĝi donas al la homo plian dimension, la aŭtentikan mondo-dimension aŭ homaro-dimension. La homo, kiu nuntempe estas jam devigata uzi plurajn lingvo-nivelojn: familian kaj profesian, ĝeneralan kaj teknikan, morgaŭ parolos flue almenaŭ du, se ne tri, lingvojn: sian nacian en siaj kutimaj rilatoj pro historia fakto, kaj la internacian en internaciaj rilatoj el kultura vidpunkto; eventuale ankoraŭ unu lokan aŭ regionan idiomon por pli vasta kultur-enriĉiĝo: jen kio estas lingva plurismo sed en vertikala senco male al la horizontala, kiu estas nacilingva poligloteco. Kaj la studo de la aliaj lingvoj same restos, kio ĝi neniam ĉesis esti: studo kun pure kultura celo...

La libereco estas nemalhavebla por la egala disvolviĝo de l'tradicioj kaj kulturoj... ĉar ĉi tiuj mem ekzistas nur dank'al ĝi; kaj sekve — pli malpli frue — ĝuste ili postulos la ekspansion de tia humanismo...

*Jean Thierry*

## GEJUNULOJ, ATENTU!

Por esprimi sian solidarecon al la Neŭtrala Esperanto-Movado partoprenonto de la *3-a Internacia Konferenco de la NEM* disponigis 700 dkr. por stipendio al junul(in)o deziranta aliĝi al la konferenco.

La stipendion povos ricevi junul(in)o ne pli ol 25-jara konsentinta prelegi en la konferenco pri junulara demando (laŭ propra elekto) enkonduke al diskuto.

Interesitoj bonvolu kiel eble plej baldaŭ, prefere tuj, turni sin al la Organiza Komitato (prez.: H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando). Informu pri la temo de la prelego (aldonu, se eble, manuskripton) kaj pri vi mem por faciligi al la Organiza Komitato la elekton de la stipendiulo.

La Organiza Komitato kore dankas al la donacinto de la stipendio kaj esperas, ke la donaco donos bonan ideon al aliaj.

*H. V. Rasmussen*

# SKULPTISTO, JEAN ARP

"La pelvoarbo" estas kreita de la germana-franca skulptisto Jean (Hans) Arp, naskita en 1887 en Strasburgo. Li distingis sin ne nur per skulptado, sed ankaŭ kiel pentristo, grafikisto kaj poeto. Li laboris ĉefe en Germanio, Francio kaj Svislando.
Arp studis arton en Weimar kaj Parizo, kaj en 1912 li partoprenis ekspozicion de "Der blaue Reiter" (La blua rajdanto), la artista kolektivo en München, kies membroj estis W. Kandinsky, Paul Klee k.a. Post la eksplodo de la unua mondmilito li iris al Svislando, kie li en Zürich estis la gvidanto de la rondo, kiu fondis la dadaismon. Post la milito li estis en Germanio kaj de 1926 en Francio, kie li aliĝis al la surrealistoj (1926-30) kaj poste partoprenis en aliaj grupoj.
Pluraj grandaj ekspozicioj de la verkoj de Arp okazis en Novjorko post la fino de la dua mondmilito, kaj li restadis en Usono en 1949-50. En la postmilita periodo li ankaŭ publikigis poemarojn en germana kaj franca lingvoj.
Sian reputacion kiel unu el la plej elstaraj majstroj de bildarto Arp akiris per siaj skulptaĵoj en organikaj-abstraktaj formoj el marmoro, bronzo aŭ gipso, per siaj reliefoj el ligno aŭ aluminio kaj per siaj bildotapiŝoj. Lian stilon karakterizas formoj derivitaj de tiu de la naturo, formoj ekstreme glataj, klaraj kaj simplaj. Li diris: "Arto estas kiel frukto kreskanta el homo, kiel frukto el planto, kiel la infano el la patrino".
Arp estis unu el la artistoj elektitaj por ornami la palacon de Unesko en Parizo. Li mortis en 1966 en Bazelo.

*H. V. Rasmussen*

# VORTOJ DE PROF. HAL KOCH

La unua estro de Altlernejo Krogerup estis dum la jaroj 1946-56 profesoro, d-ro de teologio *Hal Koch* (1904-63), kiu dum kaj post la nazia okupacio de Danlando aktivis i.a. en la ĝenerala junulara movado. Li estis prezidanto (1940-46) de la federacio de junularaj organizaĵoj, Dansk Ungdomssamvirke, kiun anstataŭis en 1946 Dansk Ungdoms Fællesraad. Tiu eldonis en la sama jaro *Manlibron de Asociaj Gvidantoj* (Haandbog for Foreningsledere) verkitan de ĝia prezidanto, *Knud Gedde*.

La libro enhavis antaŭparolon de prof. *Hal Koch* sub la titolo "Man skal kunne sit Foreningskram" (Necesas scipovi siajn "asociaĵojn"). Laŭ la konvinko, ke la enhavo de la antaŭparolo (kaj de la tuta libro) estas koniginda al danaj esperantistoj, la antaŭparolo estis tradukita en Esperanton kaj publikigita en *Kuriero* (1973) kaj *Eĥo* (1974).

Ĉar ĝi verŝajne povos esti interesa kaj utila ankaŭ al internacia publiko, kaj ĉar ĝi per la aŭtoro rilatas ankaŭ al la loko de la *3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, ni ĉi-sube represas la vortojn de prof. *Hal Koch*:

NECESAS SCIPOVI SIAJN "ASOCIAĴOJN"

Se oni volas establi fabrikon, fondi bankon aŭ funkciigi ion ajn novan en la "praktika vivo", ĉiuj plene scias, ke la kondiĉoj devas esti plenumitaj. Postulendaj estas praktika lerteco, teknika scio kaj, antaŭ ĉio, sperto kaj kapabloj por povi mastri la aferojn. Ĉiu entrepreno devas postuli, ke la "maŝinaro" funkcias relative senmanke. Ja tre facile komprenebla estas tio.

Sed tute alimaniere homoj pensas, kiam temas pri pli "spiritaj" aferoj, ekzemple pri nia vasta asocia vivo. Ĉirilate oni parolas iom malestime pri la "pure teknikaj" aferoj. Kiom utilas la bonorda tekniko, se la laboro malhavas spiriton kaj ardon? Plej grave estas havi preleganton, kiu povas "altiri" homojn kaj entuziasmigi ilin — ĉiuj bagatelaĵoj estas ja sensignifaj. Se nur entuziasmo kaj iniciatemo ekzistas, oni ne postulu pli.

Neniu volas kontesti, ke tiuj vidpunktoj estas pravaj ĝis certa grado. Sed tamen oni estu singarda. Eĉ la plej eminenta oratoro kaj la plej arde entuziasma membraro ne povas igi sensignifa la bonordan aranĝadon de la eksteraĵoj: kunvenejo, anoncado, kunventempo, kantlibro kaj multo alia. Kaj al tio aldoniĝas ankoraŭ unu faktoro: spiriton kaj entuziasmon oni ne povas krei per komando. Ankaŭ ĉirilate verŝajne estas prava la diro, ke "la spirito blovas, kien ĝi volas, kaj neniu scias, de kie ĝi venas, kaj kien ĝi iras". Sed oni povas se oni sincere volas labori — certigi, ke la eksteraj kadroj estas en ordo. Tio estas, kion oni povas postuli de ĉiu el ni, kiom ajn modestaj estas liaj kapabloj por "sensaciaj" faroj. Kaj ĝuste la prizorgado de bonordaj funkcioj havas grandegan valoron; ĝi implicas edukon, kiun oni neniel rajtas malestimi. La trankvila kaj fidela klopodado, por ke ĉiuj malgrandaj aferoj en asocio funkciu en ĝusta maniero, estas bona preparo por ebla posta transpreno de pli granda tasko. Kaj tio estas atingebla. Devus ne esti maleble prizorgi, ke la "maŝinaro" efektive funkcias, sed tio postulas — kiel ĉia faka laboro — scion, ekzercadon kaj diligentecon.

Ĉiu, iom konanta la asocian vivon en nia lando, scias surbaze de tio, kio estas priparolita ĉi tie, ke multo restas farenda. Mi estas konvinkita, ke ĉi tiu libro en tiu rilato povos esti treege utila. Vi ne estu tro "superspiritemaj" kaj "degnemaj", sed memoru, ke necesas scipovi sian fakon, ankaŭ la "asociaĵojn", kaj ke tio postulas scion kaj diligentecon.

*Trad. HVR*

# LA ANTAŬJUĜOJ!

*En ĉi tiu serio da artikoloj estos prilumitaj la plej gravaj el tiuj, kiuj bremsas la normalan disvastiĝadon de la lingvo.*

## II PRI LA LINGVO EN KONKURADO KUN ALIAJ

Kiam la malsincereco elĉerpis argumentojn sur la lingva kampo, tiam ĝi turnas sin al vantaj komparoj pri la aktuala situacio de la lingvo tra la mondo.

Se artefarita lingvo havus ian utilecon, nepre oni devus elekti el inter multaj lingvoj artefaritaj, kaj el ili unuj estas pli bone konstruitaj ol Esperanto. INTERLINGUA ekzemple estas tuj komprenebla por la plimulto el la homoj, dum Esperanto pro arbitra elekto de radikoj, pro bizara ortografio kaj pro pluraloj anti-sciencaj per "j" ĉiam konservas strangan aspekton.

Nu jam en 1907 Ernest Gaubert skribis: "*Tiu bastardo malutilas al siaj gepatroj... Ĝi estas senĉesa insulto al la beleco de la lingvoj, de kiuj ĝi naskiĝis*". Kaj Remy de Gourmont tuj superasertis: "*Esperanto estas ne multe pli ol difektita hispana lingvo...*"

Tiel evidentas la procedo: la ekziston de la lingvo oni jam ne neas, sed oni strebas por mokindigi ĝin. Ja ekzistas multaj "projektoj" de artefaritaj lingvoj: la tento forĝi sian propran lingvon estas tiel forta por multaj homoj, aparte por la "*lingvistoj profesiaj*", al kiuj aparteni ja fieris la profesoro Aurélien Sauvageot, fame konata ĉe la esperantistoj! Sed se oni reduktas kun certa pravo la kampon de sia esploro al kvar aŭ kvin projektoj postvivintaj la unuan prezento-verkon, oni konstatas, ke sola Esperanto kun baldaŭ naŭdek jaroj da vivado prezentas socian komunaĵon realan kaj literaturon senĉese disvolviĝantan.

La alloga demando pri tuja komprenebleco cetere estas nur tromplogilo, ia kvadraturo de la cirklo! Ĝi baziĝas sur la ekzisto de vortoj komunaj al la latinidaj kaj anglecaj lingvoj: kio jam limigas aparte ĝian utilan valoron. Nu la komuna karaktero estas nur laŭforma ŝajno: se "actuel" en la franca similas la italan "attuale", la hispanan "actual", la "portugalan atual" kaj la anglan "actual", bedaŭrinde ĉi tiu angla formo havas ja nek la prononcon nek precipe la sencon de la aliaj; la franca "actuel" estas tio, kio ekzistas aŭ okazas, estiĝas aŭ konvenas en la nuna momento, dum la angla "actual" signifas antaŭ ĉio: "reala". Per tiu ekzemplo oni jam konscias, kian diven-ludon formas tiu internacia vorttrezoro de laŭdire tuja komprenebleco. Ekster la sciencaj terminologioj la veraj internaciaj vortoj estas tre malmultaj: nur ŝajnaj por la plimulto! Verdire, kio estas pli ekzakte internacia, tio estas ne la vorto sed la RADIKO; kaj ĝuste ĉar Esperanto estas konstruita el radikoj, ĝi sukcesis ne nur enradikiĝi sed ankaŭ disvolviĝi.

Ekdisputi tiam pri la elekto de la radikoj!!! Pri gustoj kaj koloroj! La elekto ne estas pli arbitra ol en la angla, en kiun konfuze eniris sen ia homogeneca zorgo vortoj de plej diversaj originoj. En Esperanto almenaŭ certa morfema strukturo donas al ili unu certan familian mienon... Fakte ĉiuj ĉi kritikoj sidas sur nenia objektiva bazo: per kio la ortografio de Esperanto estus pli "bizara" ol tiu de la germana aŭ dana, franca aŭ angla, aŭ ankoraŭ ol tiu de lingvo adoptinta fonetikan principon kiel la itala? Kion povas ja signifi la esprimo "pluraloj anti-sciencaj"? Jen enestas io, pri kio deliri, se oni bonvolas memori, ke la pluraloj per "i" retroviĝas en antikvaj lingvoj!

Koncerne al la taksadoj de Gaubert kaj Gourmont, al ili pli ĝuste ja povus aplikiĝi la epiteto "anti-sciencaj"! Pro kio Esperanto estus do pli ol alia lingvo ia "bastardo"? Ĉu pro la origino de ĝia vorttrezoro? Tiam konvenus alturni la saman riproĉon kaj al la franca kaj al la angla lingvoj: se el etimologia vidpunkto oni ekzamenas la lingvon de Racine aŭ tiun de Shakespeare, oni surprize ektrovas nesuspekteblan miksaĵon efektive diverskonsistan kiel en ĉiuj alte kulturaj lingvoj pro la civilizaciaj renkontiĝoj; sed — Aurélien Sauvageot "dixit" — kio estas "*la eksterordinara fekundeco*" en tiuj lingvoj, tio subite fariĝas en Esperanto nur "*unu vera leksikona pulbazaro*"! Kaj jen kiel oni renovigas penson de Paskalo: "Vero trans la Maniko, eraro maltrans!"... Tio estas ja evidenta, diable! Precipe kiam —kiel en la kazo de s-ro Sauvageot — la lingvisto malakceptas revizii siajn sciojn pri lingvo, kiun li pririgardas "ŝtoniĝinta" jam de 1887: ekzemple li citas la vorton "movŝraŭbo" por tiu senkulpa aparato, kiun iu ajn homo kun ia Esperanto-kono tute simple nomas: "helico"! Kaj tial ĉar ĉia revizio kondukus lin al la rekono de fakto, kiu plene kontraŭdiras la tezon, kiun li subtenas por proklami la fiaskon de la lingvo; efektive, pli ĝuste ol "fabrikita" de la "genia" Zamenhof tute sola la vorttrezoro de Esperanto estas nuntempe la trafitaĵo de natura evoluo, riĉigita de la penso kaj sento de pli ol kvar generacioj! Sed fi! Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia!...

——oOOo——

Dume kiam argumento maltrafas sian celon, oni tuj reŝargas la pafilon!

La naciaj lingvoj esprimas la spiriton de la popoloj, en kiuj ili spontane disvolviĝis. La ekzisto de la naciaj lingvoj estas esenca kondiĉo por la ekzisto kaj esprimado de la societoj; Esperanto volas anstataŭi la naciajn lingvojn: ĝi konsekvence estas negativa fenomeno.

Kaj kiel ĉiam kompreneble Ernest Gaubert superasertis: "*Se vere Esperanto estas facila lingvo, vi donos al viaj adeptoj la guston por la plej eta peno*". (SIC!)

Ne indas longan atenton la valoro de tiaj argumentoj diktitaj de nura ŝovinismo. Unue Esperanto neniam pretendis elpuŝi la naciajn lingvojn krom en la argumentaro de kelkaj esperantistoj tro flamantaj de impetego kaj fanatikeco. Male, kiel ni jam vidis, Esperanto prezentiĝas kiel efika rimedo por protekti la naciajn lingvojn kontraŭ la interpenetrado, kiu — kiel montras la verko de prof. Etiemble "Ĉu vi parolas franglе? — nepre ilin inside diserigus, precipe se unu el ili supervenkus la aliajn, kaj sekve se altrudiĝus unu vera Babel-Turo, kie najbarus kun la frangla ankaŭ la germangla, italgla, dangla, svedgla, ktp... Ĉar, altrudi nacian lingvon ekster ĝiajn naskolimojn estas nure dediĉi ĝin al detruado, renovigi la malrapidajn procezojn de la latina lingvo: neniu el tiuj lingvoj, kiuj ĉiuj baziĝas sur la nura arbitreco de la uzado, kapablus efektive rezisti al la korodado de la "substratoj"! Sekve kaj pli ĝuste ol "negativa fenomeno" Esperanto estas la sola pozitiva rimedo por konservi la lingvan kaj kulturan integrecon de la diversaj societoj kaj naciaj kaj regionaj.

——oOOo——

Kaj fine kiam elĉerpiĝis la argumentoj, senmaskiĝas la veraj kaŭzoj de la asertado! Hej! La vera internacia lingvo de ĉiuj uzata hodiaŭ — oni asertos al vi per ne diskutinvita tono — estas la angla lingvo. Konsidere la disvastiĝon de la angla, ĝian kreskantan influon kaj la verkokvanton en la lingvo produktitan en ĉiuj partoj de la mondo, estas utopie supozi, ke Esperanto iel povos konkuradi kun ĝi. Cetere, se alia lingvo devus estontece anstataŭi la influon de la angla, tiam estus la franca aŭ la germana aŭ ankaŭ la rusa.

Kial ne la ĉina? Ni konis hindan ĵurnaliston, kiu ne hezitis deklari ĝuste en la angla lingvo, ke jam ne estas for la tago, kiam al la sanskrita lingvo revenos la rolo de internacia lingvo. Kiu ja en la unua jarcento estus povinta antaŭdiri al romia imperiestro, ke la latina tute malaperos? La disvastiĝo de nacia lingvo estas plej ofte afero de politiko, ekonomiko kaj modo. Ni komparu la aktualan formuladon de tiu argumento kun tiuj de 1907. Remy de Gourmont tiam deklaris: "*La lingvo de la diplomataro kaj kosmopolita mondo estas la franca... La vojaĝantoj sin komprenigas preskaŭ ĉie en Eŭropo per la franca; ekster Eŭropo per la angla... En la internacia beletra mondo la korespondado efektiviĝas en la franca*". Ernest Gaubert precizigis: "*Por la aferoj traktataj — parole — sur la grandaj internaciaj merkatolokoj la angla kaj la franca estas la solaj akceptitaj. Esperanto cetere malbone fleksiĝas por la komerca korespondado*". Kaj por la bukedo de tia piroteknikaĵo aliaj aldiris: "*La latina estas la internacia lingvo*"; — aŭ eĉ pli krude: "*La franca estas la internacia lingvo; Esperanto estas do anti-franca verko*".

Nu, la ĉefa merito de ĉi tiu nova lavango da antaŭjuĝoj estas almenaŭ la sincereco! Ĉi-foje oni neniel kaŝas la vojon al siaj preferoj: temas ja pri ŜOVINISMO, kiam la elektita lingvo koincidas kun la patrina; pri KONFORMISMO. kiam la elektita lingvo troviĝas la laŭmoda (por kiom da tempo?); aŭ pri SNOBISMO, kiam la elektita lingvo fariĝas tiu de socia klaso kun kastismemo!

La malfacilecoj de la latina por iĝi universala estas nevenkeblaj: necesus jam aldoni tutan modernan vortprovizon, kiel faris la aŭtoro de "La latina sen peno" ĉe ASSIMIL! Kiel nomi efektive naztukon aŭ pantalonon, ŝtrumpon aŭ mini-jupon, biciklon aŭ aŭton, trajnon aŭ aviadilon, ktp...? Kaj se necesas rezigni la latinan de Cicero por knedi kelneran latinaĵon, tiam ne plu estos la latina! Aŭ de ĝi almenaŭ restos nur la senutilaj komplikaĵoj: kvin deklinaciaj paradigmoj kun kvin kazoj, kvar konjugaciaj tabeloj kun plia voĉo dirita "deponenta", eĉ sen mencii la armeon de la neregulaj vortoj kaj verboj! Cetere en freŝdata kongreso de "VITA LATINA", kiu okazis sub la prezidado de Leópold Sanghor, ĉi tiu sin esprimis en la franca, ĉar — li konfesis — "*mon commerce avec les lettres latines a cessé depuis trop longtemps!*" (miaj rilatoj kun la latina lingvo ĉesis jam de tro longe!) Tial voli, ke la latina iĝu universala, do de ĉiuj uzebla, jen ĉipaŝo ne-serioza!

La franca, kiel internacia, neniam estis pli ol ia helpa lingvo, ĉar — kiel la angla — ĝi ne estis speciale formita por tia uzado. Historie ĝi aspektas precipe kiel lingvo de unu elito; kaj se ekster Francio ĝi estus disvastigita al ĉiuj sociaj klasoj, ĝi samtempe estus dediĉita al detruado malrapida sed certa, kiel jam atestas ekzemple la kreolaj lingvaĵoj kaj eĉ la formiĝo mem de la angla lingvo. Jes, ĉiuj etnaj lingvoj diseriĝas, kiam ili estas uzataj por celoj, por kiuj ili ne estis speciale formitaj.

Tial al la argumento de Ernest Gaubert, kiel tipo de ŝovinismo, indas respondi: pli ĝuste ol "anti-franca verko" Esperanto estas protektilo por la lingvo! Kaj same estas pri ĉiuj aliaj lingvoj!

*(daŭrigota) J. T.*

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna
N-ro 7

## 6 KONFIDENCA DOKUMENTO PRI LA AGADO EN MONTEVIDEO

(Daŭrigo; la komencon v. en *Horizonto* n-ro 6/1976).

*6.2.6 La Meksikia Rezolucio en la Programkomisiono (el la let. de 05.12.1954).* — Dum la tuta vendredo kaj sabaton matene oni diskutis en la Programkomisiono aliajn fakojn. La kulturaj aktivadoj estis reprenitaj sabaton posttagmeze (04.12). Mi utiligis tiun tempon por prilabori amason da delegacioj. Mi parolis tute speciale kun la prezidanto de la franca (mi skribis leteron al la ministro, kiu estis la prezidanto, sed li forveturis kaj tiel la letero venis en la manojn de la nova prezidanto), kaj li firme certigis min, ke Francio apogos la meksikian delegacion kaj ke li donos instrukciojn al delegito François voĉdoni por. Subtenon promesis: Brazilo (Prof. Carneiro), Nederlando (Prof. Sassen), Italio (Prof. Veronese), Luksemburgo, Hispanio, Norvegio (krom la p-to 4), Liberio, Vjetnamio, Indonezio, Filipinoj, Ĉinio, Panamo, Nikaragvo, Kubo, Aŭstrio, Kostariko, Honduraso... Entute, kune kun tiuj, kiuj respondis favore al la Sekretariato kaj pri kiuj mi kalkulis, ke ili voĉdonos favore[13], mi havis proksimume 25 delegaciojn, kiuj promesis subteni. Mi komencis esperi, ke la miraklo tamen okazos...

Posttagmeze oni longe diskutis pri la Mondhistorio[14]. Poste, fine, venis nia punkto. La sekretario terure mallonge, en 20 sekundoj, diris, ke nun oni diskutos pri la Peticio kaj aldonis, ke temas pri la Dok. 8C/PRG/3 (kiu enhavas la Raporton de la Sekretariato pri la respondoj de la ŝtatoj). Estis normale, ke post tio mi ricevu la parolon, ĉar, ja, mi reprezentas la subskribintojn kaj, krome, antaŭ pluraj tagoj mi anoncis min. Sed subite petis la parolon, samtempe kun mi, Prof. Blinkenberg. La Prezidanto (Bourgeois) donis al li la parolon kaj mi estas pli ol certa, ke tio estis antaŭe interkonsentita. Prof. Blinkenberg diris, ke li parolas kiel lingvisto kaj en tiu kvalito li asertis, (I) ke Esperanto tute ne estas internacia, ĉar ĝi konsistas nur el eŭropaj elementoj; ke ekzistas aliaj lingvoj internaciaj, ekzemple Basic English, Interlingua kaj aliaj, kiuj estas multe pli bonaj ol Esperanto, sed ke li entute estas kontraŭ tiuj "artefaritaĵoj", en kiuj oni eble povas esprimi la urugvajan menuon (granda rido), sed ne la literaturajn valorojn; (II) ke Esperanton "inventis" amatoro, kiu nenian ideon havis pri lingvoj kaj ke tial Esperanto havas mizeran aspekton, povran vortaron, primitivan sintakson, en kiu oni nenion povas diri kaj ankoraŭ malpli esprimi la grandajn sentojn de amo — "kvankam mi tion esperas", li diris (novaj ridoj); (III) ke Esperanto estas la neo mem de kulturo kaj tute ne povas servi al kulturaj celoj. "Kvankam ekzistas grupeto da personoj, eĉ tre aktivaj, kiel vi povis konstati — li daŭrigis en ironia tono (novaj ridoj) — tamen tio estas sensignifa grupeto." Li finis en absolute neserioza atmosfero dirante, ke estus ofendo por Unesko, se ĝi donus ian ajn apogon al Esperanto. Lia celo estis ridindigi la tutan aferon. Li sukcesis. Li sukcesis tial, ĉar li estis terure akra kaj neniu el la ĉeestantoj — krom la esperantistoj — povis kontroli la neobjektivecon, nesciencecon de liaj stultaj, klaŭnaj diroj.

En tia atmosfero la prezidanto donis la vorton al mi. Mi devas diri ĉi tie, ke antaŭ kelkaj tagoj oni decidis en la Komisiono — por rapidigi la laboron — ke la tempodaŭro estos limigita al 3 minutoj. Kion mi povis diri en tiuj 3 mizeraj minutoj? Mi estis preparinta paroladeton precize de 3 minutoj, en kiu mi volis akcenti la gravecon de la Peticio, la noblan kontribuon de la esperantismo al interkomprenîĝo de la popoloj, la kulturajn valorojn kreitajn en Esperanto kaj fini per la citaĵo de Romain Rolland. Mi sentis min devigata rebati almenaŭ parte tiun insultan paroladon. /.../ [15]. La tutan paroladeton mi faris per glacie malvarma vizaĝo, tiel ke post 30 sekundoj revenis la seriozeco. Post mi parolis bonege la urugvaja delegito, kiu protestis, ke pri tiel serioza afero oni parolis tiel nedigne kaj neserioze. Li deklaris, ke li apogos la meksikian rezolucion. Post tio mi denove petis la parolon, sed la prezidanto ne donis ĝin al mi. Prof. Sommerfelt diris, ke Esperanto el ĉiuj "lingvoj artefaritaj" estas la plej disvastiĝinta, sed ke li voĉdonos kontraŭ la rezolucio.

*6.2.7 Voĉdono (el la sama let. de 05.12.1954).* — En tiu momento la prezidanto voĉdonigis la tekston. Mi aldonu ankoraŭ, ke la meksikia delegito silentis kiel fiŝo kaj tute ne komprenis kio okazas (malfeliĉe ne estis tiu, kun kiu mi parolis en la lastaj tagoj); ke Prof. Sassen ne ĉeestis, sed alia nederlanda delegito, ke Prof. Carneiro ne ĉeestis, sed alia brazila delegito; ke la aŭstriaj delegitoj tute ne ĉeestis...

La rezulto de la voĉdono estis malbonega: 3 por (Meksikio, Ĉinio, Urugvajo), 23 kontraŭ, 19 sindetenoj. La meksikia rezolucio, do, estis rifuzita. Mi estas certa, ke voĉdonis kontraŭ: Svedio, Norvegio, Francio, Danlando, Nederlando, Svislando. Mi estas certa, ke sin detenis: Sovetunio, Pollando, Bjelorusio, Ukrajnio, Hungario, Ĉeĥoslovakio... Mi ne povas diri kiel voĉdonis Britio, Usono, jugoslavio kaj aliaj landoj, sed verŝajne Usono voĉdonis kontraŭ kaj verŝajne Britio sin detenis. Estis malfacilege kontroli, ĉar oni voĉdonas per levado de la manoj kaj tio daŭras nur kelkajn sekundojn.

Mia opinio estas, ke tiu malsukceso ŝuldiĝas al la atemosfero de neseriozeco kaj ri-

dindeco, en kiu prezentiĝis Esperanto kaŭze de la interveno de Blinkenberg, interveno tute certe organizita de la kliko de malamikoj. En tiu terura atmosfero eĉ tiuj, kiuj firme estis promesintaj subteni, ŝanceliĝis kaj sekvis la fluon.

En kiu animstato mi troviĝis dum tiuj teruraj momentoj, mi neniam povos preskribi al kiu ajn. Mi tamen konservis absolute malvarman sangon kaj en iu rilato sentis min kaj nian aferon alte superecaj al tiu amaso da senideeco kaj sencerbeco (Prof. Blinkenberg traduku tion en sian perfektan lingvon, se li povas!), en tiu marĉo de intelektula mizero kaj senkuraĝeco. Nu, mi restis en la salono kaj pensis kiel, tamen, ion atingi. Mi sendis noteton al la sekretario dirante, ke ŝajnas al mi ke la Komisiono devus akcepti aŭ malakcepti la Raporton, nome la konkludojn de la Sekretariato en la Dok. 8C/PRG/3. Mi volis atingi favoran decidon almenaŭ je tio, ĉar en tiuj konkludoj oni nete akcentas, ke la fakto, ke Unesko ne okupiĝos en la sekvantaj 2 jaroj pri Esperanto, neniel implicas iel ajn malfavoran juĝon pri la lingvo... La sekretario respondis skribe, ke ne necesas voĉdoni. Kiam la prezidanto volis fini la kunvenon, mi denove petis la vorton kaj, post iom da lukto, li donis ĝin al mi. Mi diris ke, post la malakcepto de la meksikia rezolucio, laŭ mia opinio la Komisiono devus deklari ĉu ĝi akceptas la Raporton de la Sekretariato. La prezidanto diris, ke tio ne estas necesa, sed la novzelanda delegito apogis min. En tiu momento intervenis Prof. Nielsen (Blinkenberg foriris post kiam li faris sian "laboron") kontraŭstarante la proponon. Tamen, mi sukcesis, kaj la komisiono akceptis la Raporton de la Sekretariato. Tiamaniere neniu iam ajn povos diri, ke la decido de la Komisiono entenis juĝon pri la valoro de la lingvo. Kompreneble, mi taksas la opinion de la Komisiono pri tiu afero proksimume same kiel opinion de azeno pri la gusto de fiŝo, sed iaj homoj povus utiligi tiun decidon, misprezentante ĝin, se ne ekzistus tiu alia decido.

Post tio mi ankoraŭfoje petis la vorton kaj deklaris, ke en la Peticio estis klara kaj konkreta propono al Unesko kuraĝigi la disvastigon de Esperanto. Al tiu propono ni deziras havi same tiel netan kaj klaran respondon: jes aŭ ne, ĉar ankaŭ la nea respondo estas por ni multrilate grava. La malakcepto de la meksikia rezolucio signifas nur malakcepton de unu ebleco de pozitiva respondo, sed ĝi neniel inkluzivas ian ajn negativan respondon. Sekve, mi diris, mi petas la prezidanton diri al mi kio estas, laŭ lia opinio, la respondo de Unesko. Li estis tre konfuzita kaj ne sciis kion respondi, ĉar la komplotintoj ne antaŭvidis tian demandon. Do, post iom da hezitado, li diris: "La respondo estas, ke en la sekvantaj 2 jaroj Unesko ne antaŭvidas iajn specialajn aktivecojn rilate Esperanton surbaze de la Peticio". Tiam, kvankam li ne plu volis doni al mi la vorton, mi deklaris: "En tiu okazo mi deklaras en la nomo de UEA, ke la afero restas malfermita kaj mi rezervas la rajton de UEA reveni al ĝi, kiam ĝi mem opinios tion oportuna".

Tiel, do, finiĝis mia vere superhoma lukto en Montevideo dum 34 tagoj kaj noktoj.

*6.2.8 Kio farebla ankoraŭ? (el la sama let. de 05.12.1954).* — Post la kunveno /de la Programkomisiono/ mi tuj kunvenis kun la esperantistoj kaj mi kunmetis bonegan leteron por ĉiuj ĉitieaj gazetoj en la nomo de la Urugvaja Esperanto-Societo[16]. En la letero ĝi protestas en la nomo de kulturo, scienco kaj edukado kontraŭ la nekultura ago de la dana delegito. Tiu letero — oni ĵus telefonis al mi — estas jam transdonita al ĉiuj gazetoj kaj mi esperas, ke ĝi morgaŭ aperos. Tio estos bombo, kiu altiros al la ekspozicio[17] certe novajn amasojn. Plue, ni kunmetis mallongan, sed tre trafan leteron por la dana ĝenerala konsulo, en kiu la Urugvaja Societo deklaras, ke pro la ofendoj, kiujn faris Prof. Blinkenberg al la subskribintoj de la Peticio, al la kultura valoro de la Internacia Lingvo kaj al la lando, kiu gastigas la Konferencon, la Urugvaja Societo resendas la filmon pri Danlando kaj ne plu deziras ĝin prezenti en la ekspoziciejo. En la letero estas plue deklarite, ke la sinteno kaj vortoj de Blinkenberg estas ofendaj ankaŭ por la dana registaro, kiu produktis kulturan filmon en Esperanto. Havu tiu sinjoro iom da malagrablaĵoj. Kompreneble, pro mia pozicio en la Konferenco, mi provizore nenion entreprenas publike, sed mi planas leteron al la prezidanto de la Konferenco, en kiu mi protestos kontraŭ la ago de Blinkenberg bazante la proteston sur la Konstitucio de Unesko, kiu proklamas la plenan egalecon de lingvoj kaj sur la Deklaracio kontraŭ la lingva diskriminacio.

Ĉu mi aldonu, ke en la pasinta nokto mi eĉ ne fermis la okulojn, sed turniĝis en la lito senhelpe?

*6.2.9 Venko! (el let. de 10.12.1954).* — Kun tremantaj manoj kaj malsekaj okuloj mi skribas al vi tiun ĉi leteron. Antaŭ duono de horo mi sendis telegramon pri la belega novaĵo atingita en la lasta duonhoro de la Konferenco. Estas por mi absolute maleble priskribi kion mi faris en la lastaj 5 tagoj, nome de lundo ĝis la nuna momento. Mi nur diru, ke dum tiuj 5 tagoj mi — jam lacega de pli frue — ne dormis entute pli ol 18-20 horojn, trinkis centon da kafoj kaj fumis ĉ. 1000 cigaredojn. Mi estas plene, sed vere plene elĉerpita kaj verki kion ajn en la nuna stato estas absolute maleble. Tial mi donas nur la rezulton: je la 17.30 la Pleno de la Konferenco, en ĉeesto de ĉiuj delegacioj kaj kun plenŝtopitaj galerioj, akceptis per 30 voĉoj kontraŭ 5 kaj 17 sindetenoj (la aliaj ne voĉdonis) jenan *Rezolucion* "..."[18].

Tiu Rezolucio signifas la plej fortan rekonon en la tuta historio de nia Movado pri la kultura valoro de Esperanto kiel ekzistanta kaj plene funkcianta lingvo. Per ĝi la Ĝenerala Konferenco agnoskas, ke Esperanto atingis *tiajn rezultojn*, ke ili devas esti konsiderataj kiel kontribuo al la celoj de Unesko, nome al la scienco, edukado, kulturo, proksimigo de la popoloj, interŝanĝo de ideoj kaj personoj, faciligo de internaciaj rilatoj ktp. laŭ la Konstitucio kaj Baza Programo de Unesko.

La konsultaj aranĝoj estis unuanime aprobitaj antaŭ 4 tagoj ankaŭ en la Pleno. Sekve, ni nun havas firman bazon en Unesko per la konsultaj aranĝoj[19] kaj fortegan batalilon de propagando per la Rezolucio. La Rezolucio, krome, signifas nuligon de la fama decido de la Komisiono por Intelekta Kooperado de la Ligo de Nacioj kaj plenan nuligon de la hontinda decido de la Programkomisiono de la 4-a de decembro, tute speciale de tiu aĉa makulo, kiun ĵetis en tiu kunsido sur nian lingvon kaj Movadon Prof. Blinkenberg ridindigante publike ĝin kaj ĝiajn atingaĵojn. Se mi aldonas, ke post la voĉdono ekestis aplaŭdoj en la tuta salono kaj sur la galerioj (la afero estis treege diskutata en la lastaj tagoj en la koridoroj de Unesko kaj en la gazetaro), vi povos eble iom kompreni la grandan kontentigon, kiun ricevis nia Movado kaj la sentojn de fiero kaj kortuŝo, kiuj ekregis min. Homoj leviĝadis de siaj seĝoj por gratuli. Ĝi estas la plej granda kaj la plej mirinda venko de mia vivo. Ĝi estas la plej bela donaco, kiun homo, dediĉinta la plej belajn jarojn de sia vivo al tiu nobla celo, povas doni al la Esperanto-Movado por la Nova Jaro.

13. V. piednoton 1; 14. Dum tiu sesio de la Ĝenerala Konferenco oni multe diskutis pri publikigo de mondhistorio fare de Unesko; 15. Esperanto-traduko de tiu paroladeto troviĝas en la libro *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*, p. 33; 16. Urugvaja Esperanto-Societo kaj ĉiuj ĝiaj funkciuloj, precipe Prof. Fernández-Menéndez kaj Prof. L. Cao donis grandegan helpon en la tuta afero. Post la eventoj de Hamburgo (1974) Urugvaja Esperanto-Societo kaj la meritplena Prof. L. Cao eksiĝis el UEA; 17. Temas pri la Universala Ekspozicio de Esperanto (v. ankaŭ piednoton 9); 18. La teksto de la Rezolucio troviĝas en la verko *Esperanto en Perspektivo*, p. 773 kaj, interalie, en ĉiu Jarlibro de UEA ekde 1955; 19. Poste la «konsultaj aranĝoj» ricevis la nomon «konsultaj rilatoj» kaj UEA, pro sia efika kunlaborado kun Unesko kaj plia fortikiĝo, atingis la prestiĝan kategorion B (v. pri tio en 22.3.5.1 de *Esperanto en Perspektivo*).

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3.4 de *EeP*.

(Daŭrigo en la sekvanta numero)

## 7 DU PLIAJ MALNEŬTRALAJ INSTANCOJ EN UEA

(Daŭrigo de la p-to 7, publikigita en *Horizonto* n-ro 6/1976)

7.3 *Rekono de plia kontraŭstatuta decido.* — En 3.1.2 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-ro 3/1976) estis analizita la partipolitika programo de *Centra Laborrondo Esperanto de GDR (CLE)*, nete kontraŭa al la principo de neŭtraleco de UEA. Kiel ni informis kaj komentis en p-to 7 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-ro 6/1976), la Komitato de UEA en Ateno akceptis ankaŭ tiun instancon kiel aliĝintan asocion, kvankam ĝi eĉ ne estas "laŭorde organizita" en la senco de art. 13 de la Statuto. Krome, la Komitato akceptis ankaŭ la aliĝon de *Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR)* kiel plian malneŭtralan instancon el Ĉeĥoslovakio.

Verŝajne pro la maltrankvilo, kiun kaŭzis inter la membroj tiuj pliaj krudaj malobservoj de la Statuto (tiurilatajn leterojn la nuna gvidantaro de UEA rifuzis publikigi), la "estrarano pri landa agado", d-ro W. Bormann, nun aperigis 2-paĝan artikolon, en kiu li klopodas pravigi per pseŭdoargumentoj la akcepton de tiuj du instancoj (*Esperanto*, n-ro 12/1976, p-oj 197-98). Interalie, li skribis por naivuloj: "La Komitato pretis akcepti la aliĝpetojn de AESSR, nur kiam reprezentanto de ĈEA deklaris kiel volon de la 2 asocioj iam prezenti nur unu membrecon en UEA". Por rapidigi la alvenon de tiu "iam" ŝajnas, ke necesis "konvinki" la Komitaton senprokraste akcepti tiun instancon en Slovakio, ĉar, jen, tuj plia "argumento": "Tio tamen eblas nur se la du nunaj asocioj povos intertrakti pri tio sur egala nivelo, kaj tio necesigas la aliĝon de AESSR". Do, por havi "*iam* unu membrecon", necesis *nun* havi "duoblan membrecon" kun *unu plia* komitatano A el tiu lando! La "estrarano pri landa agado" neniel klarigis, kial por intertrakti "sur egala nivelo" necesis akcepti plian malneŭtralan instancon en UEA, nek li diris unusolan vorton pri tio, ke la ŝtataj-partiaj instancoj — ne la esperantistoj — en ĈSR decidas, ĉu estos unu aŭ du "asocioj" kaj, sekve, unu aŭ du "reprezentiĝoj" kaj, rezulte, unu aŭ du komitatanoj A el tiu lando en la Komitato de UEA. Kompreneble, ili preferis havi du kaj tiamaniere fortikigi la partipolitikan blokon en UEA. Fakte, se la Komitato de UEA agus konforme al la Statuto de la Asocio, ĝi devus ne nur malakcepti la aliĝpeton de AESSR, sed ankaŭ postuli la eksiĝon de ĈEA — aŭ eksigi tiun instancon — pro ĝiaj klare kontraŭneŭtralecaj Programo kaj agadoj, kiel abunde dokumentite en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj plurfoje en tiu ĉi rubriko.

Tio kondukas al plia misprezento de la Statuto en la menciita artikolo. D-ro Bormann asertas: "Tial la Statuto de UEA, en la artikolo pri la neŭtraleco de siaj landaj asocioj, postulas tute prave neŭtralecon en iliaj statutoj kaj ne pesas ĉiun eron en la agadoj de la landaj asocioj...". Kompreneble, la Estraro de UEA "ne pesas ĉiun eron en la agadoj de la landaj asocioj". Pri tio neniam temis. Sed, kaj la Estraro kaj la Komitato ja devus *rigore "pesi" tiujn agadojn, kiuj estas evidente kontraŭaj al la Statuto de UEA*, en tiu ĉi kazo al la fundamenta principo de neŭtraleco. Kaj ĝuste pri tio temas.

Konscie malatenti tion — kaj la menciita artikolo pli ol klare montras la lucidan konscion pri la afero — signifas konscie malobservi esencan regulon de la Statuto kaj publike rekoni tion.

Eĉ pli klara rekono rilatas al la kontraŭstatuta akcepto de la *Centra Laborrondo Esperanto (CLR) en GDR*. En sia rekomendo al la Komitato en Ateno, la Estraro de UEA eksplicite notis, ke "per tiu aliĝpeto prezentiĝas peto de organizaĵo *ne antaŭvidita en la Statuto de UEA*", sed ĝi tamen "ĝenerale opinias, ke estas eble al la Asocio akcepti CLE kiel aliĝintan landan asocion". Plia hipokrita misprezento de la Statuto, nur "ne antaŭvidas tian specon de organizaĵo" por aliĝo, sed ĝi eksplicite preskribas, ke sole *politike neŭtrala* kaj *laŭorde organizita landa asocio* povas aliĝi al UEA: CLR estas nek politike neŭtrala, nek laŭorde organizita landa asocio, sed unu el la ses sekcioj de la ŝtata-partia Kulturligo de GDR.

7.4 *Plia komento.*—*der Esperantist*, kies oficiala sub titolo estas "Informbulteno de Esperanto-Amikoj en la Kulturligo de GDR" (do, eĉ ne de esperantistoj) kaj estas eldonata de tiu ŝtata-partia institucio, informis pri la "aliĝo" per dikaj literoj sub la titolo "Centra Laborrondo — kolektiva membro de UEA". Do, eĉ ĝi ne kuraĝis trompe skribi "aliĝinta landa asocio", la sole ebla kategorio por "laŭorde organizita landa asocio", sed uzis la esprimon "kolektiva membro", kiu tute ne ekzistas en la Statuto de UEA. Oni povas legi en tiu informo, ke pri "la aliĝo de GDR en UEA kaj pri kongreso raportis la tutrespublika gazetaro, i.a. *Neues Deutschland* per 30-linia informo la 7./8. aŭgusto 1976" /de la 7-a kaj 8-a de aŭgusto 1976, *mia rimarko*/. Evidente, la "tutrespublika gazetaro", inkluzive la ĉeforganon de la partio, rigardis la "kolektivan membrecon en la mondorganizaĵo" kiel gravan politikan venkon. Necesas memorigi la ignorantojn aŭ tiujn, kiuj inklinas forgesi, ke temas pri la sama GDR, en kiu ĝis la mezo de 1974 ĉiuj publikaĵoj de la ĝishamburga UEA, partipolitike strikte neŭtrala, eĉ ĝia *Jarlibro*, estis sisteme konfiskataj. Ĉu la nuna "granda amo" de GDR al UEA, eĉ se ne ekzistus unusola el la multnombraj dokumentoj pri la tuta partipolitika konspiro, vere ne pensigas eĉ la mensajn blindulojn, ke partipolitikaj fortoj ekregis la gvidadon de la Asocio? Ĉu, fine, la membraro de UEA ankoraŭ fidela al la principo de neŭtraleco, precipe la dumvivaj membroj, kaj almenaŭ tiuj 4 komitatanoj, kiuj voĉdonis kontraŭ la akcepton de CLR, aŭdigos sian voĉon kaj almenaŭ postulos la publikigon de la tuta dokumentaro pri tiu nova politika afero en UEA? Ĉu la nuna gvidantaro de UEA kuraĝas aŭ ne kuraĝas publikigi almenaŭ tiun "novan statuton" de CLE, kiu, kvazaŭe, "ne plu entenas devigon por la membro sekvi iun gvidlinion"? Kaj ĉu la Estraro pretas publikigi ian eksplicitan deklaron de la Kulturligo en GDR, ke fakte la Laborrondo kiel unu el la fakoj de la Kulturligo ne plu estas devigita sekvi la gvidlinion de tiu Kulturligo, se la aserto pri la "nedevigo sekvi iun gvidlinion" entenas ereton da vero? La esperantistaro — ĉu ankoraŭ en UEA, ĉu ekster ĝi — kaj ankaŭ la vasta publiko en la demokrata mondo rajtas sciiĝi pri la vero.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP* kaj 5.4 de *Hamburto en Retrospektivo*.

ABONO AL "HORIZONTO"

Jen nia unua numero por la jaro 1977-a. Nia deziro estis kaj restas ke la revuo estu plaĉa al vi. Vian jarkotizon por 1977, vi povas pagi rekte al la Administracio (500 pesetoj) aŭ al niaj perantoj laŭ la listo, kiu aperas en ĉi tiu numero. Dankon!

## SCIIGO PRI INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ

Pri ĉi-supra vortaro mi sciigas ke mi retiris min kiel redaktoron, dum mi *ne* nomumis revizionton por eventuala nova eldono. Mi lasis tien al la eldona firmo Kluwer, kiu dume nomumis s-ron E.L.M. Wensing.

Ĉi tio tute ne signifas ke *mi* aprobas tiun nomumon. Male! Ĉar nur mi povas adekvate juĝi ĉu Wensing taŭgus kiel revizianto ĝuste de ĉi tiu specifa libro, kaj precipe ankaŭ rigarde al la pluaj planoj kiujn mi iam havis pri ĝi, mi *malakceptas* lin por tiu funkcio; cetere ankaŭ kiel homon. Sed tio ja ne estas decida ĉi-kaze, ĉar mi retiriĝis, tiel ke la respondeco pri la nomumo apartenas ne al mi sed al la eldonisto. En detala letero al la eldonisto mi urĝe atentigis pri miaj rajtoj kiel projektinto, kompilinto kaj redaktoro de la vortaro, same kiel pri tiuj de la kunlaborintoj por iliaj respektivaj lingvoj. La eldonisto promesis al mi observi ĉi tiujn rajtojn.

Ĝis nun presiĝis 5500 ekzempleroj de la vortaro.

*F. Munniksma* (Nederlando)

# TRI OPTIMISTAJ POEMOJ

Inter la fino de la napoleonaj militoj kaj de ĝiaj politikaj sekvoj kaj la komenco de la industria revolucio kaj ĝiaj sociaj perturboj, Eŭropo konis, en la kvara jardeko de la XIXa jc., tempeton de provizora trankvileco, kiu lasis sian spuron en la tiutempa arto. Se limigi nin je la poezio, jen tro atestaĵoj de tiu spiritstato, kiuj, jam belaj per si mem, akiras nuntempe ian novan freŝecon, kvazaŭ rebriloj el ia perdita paradizo...

En Julio 1831 la maljuna Goethe volis dediĉi siajn lastajn fortojn al la finperfektigo de la vasta, jam de jardekoj projektita fe-spektaklo, la dua "Faŭsto". En ties kvina akto, la lasta nokto, kiun devas ĝui la heroo, komenciĝas per speco de himno, kiun la gvatisto Linceo kantas "el la supro de la kastelturo", celebrante la belecon de la videbla mondo. Kaj trans la persono de Linceo duonvidiĝas la figuro de la 81-jara poeto mem, kiu iam konfesis: "La okulo estas la organo, per kiu mi ampleksis la universon". Sed, en sia profunda saĝo, la Olimpano subkonsciis, ke tiaj momentoj de ekstazo estas efemeraj, kaj li aranĝis sian intrigon tiel, ke tuj post tiu kanto eksplodas la finofara katastrofo. Jen do (kiom mi kapablis konservi la artecon de tiu poemo, kiu kunligas sublimecon de la penso kun simpleco de la vortoj), jen do la

### *Himno de Linceo, la Gvatisto*

Por vidi naskita,
Vokite por vaĉ',
Mi gardas la Turon.
La mond' — mia plaĉ'.

En for' kaj proksimo
'stas mia observ',
La lun' kaj la steloj,
L'arbar' kaj la cerv'.

Ĉie do vidiĝas
L'eterna dekor':
Al mi ĉar ĝi plaĉas,
Plaĉas mi ankor'.

Feliĉaj okuloj,
Ĉi vida rivel',
— Iĝu, kio volas —
Tamen estis bel'.

En 1839 Viktoro Hugo estis 37-jara; li havis malantaŭ si kvin grandajn poemlibrojn, ok dramojn kaj unu romano, "Nia Sinjorino de Parizo"; lin ĝis tiam ne trafis vera doloro, kia estos baldaŭ por li la drono de lia ĵus edziniĝinta filino, li sentis sin bonstata en la socio, feliĉa ĉe la virinoj, profunde akordiĝanta kun la naturo kaj plena de la deziro radiigi en siaj versoj "la belegecon de la Dia kreaĵo". Ĉio tio speguliĝas en tiu ĉi odeto, el kiu mi tradukis la plej belajn strofojn:

### *Spektaklo trankviliga*

Ĉio 'stas lumo, ĉio ĝojo.
La arane' en diligento
Kroĉas al silko de l' levkojo
Siajn puntaĵojn el arĝento...

Dumtaga lun' tepide palas,
Kiel resaniĝant' espera;
De la vizaĝ' opala falas
La mildo de ĉiel' tenera.

Ĉe l' keirant' abelo niĉas
Flirte en l' olda fendo mura.
La varma sulk' en gaj' vekiĝas,
Movate de la ĝerm' obskura.

Viv' ĉie. Klinas sin amema
La sunradi' al sojl' aperta,
La fuĝa ombr' al flu' kurtrema,
La ĉielblu' al monto verda.

Kampojn briligas ĝoj' kaj puro,
Herb' floras kaj arbar' kvivitas.
Homo, ne timu! La naturo
Scias pri l' finsekret', kaj ridas.

Du jarojn poste, pli juna angla poeto, Roberto Browning, publikigis, sen granda sukceso, ian dialogan poemon "Pasas Pippa": en ĝi li iel konkretigis la impreson de ĝoja feliĉo, kiu frapis lin, ĉe lia vizito, an Aprilo 1838, de pitoreska itala urbeto, Asolo. Pippa, la silkteksistino, estas humila knabino, sed per sia ekzisto mem, sia pura gracio ŝi nekonscie influas la sortojn ĉirkaŭ ŝi; ŝi pasas, kantante, tra la stratetoj, ĉar estas ŝia sola ferio, la Novjara tago; kaj ŝiaj kantoj estas kvazaŭ la likvaj perloj, falantaj de la malnova kampanilo. Jen eble la plej bela, kaj certe la plej fama:

*Pippa kantas*

Printempa sezon',
La tag' — je l' aŭror',
Je l' sepa — maldorm'!
Rosperlas surmonte.

Alaŭdo en sor',
Helik' sur la dorn',
Di' sur sia tron' —
Bonordas tutmonde.

Ĉu ne io por revigi, ke en malmulte da jaroj la voĉoj de tri grandaj poetoj samagorde respondis unu la alian, de Weimar al Parizo, kaj de Parizo al Londono? Brava malnova mondo...

*G. Waringhien*

# SONETO AL POETO

*Se morti estas ekdormi...* G. A. Bécquer

Poeto de la am' kaj kordoloro,
aŭtoro de l' admirinda verko "Rimas",
en kiu ŝprucas la sopir de l' koro
kaj febraj sentoj tiom ĉarme rimas!

En via poezi' — intim' lirika:
poemoj viaj belaj flue sonas
kaj ravas nin per sia ton' muzika
mirindaj versoj en l' anim' resonas.

Penetras koron frazoj de sincero —
reeĥoj de sopiro kaj espero,
impet' de arda kor' kaj fantazio.

Inspiras nun poetojn via vorto,
do pace dormu en la nokt' de morto:
eterne vivos via poezio.

29.11.1976
*Anatolo Koba*



*Márton Kalász, poeto kaj beletra tradukisto, naskiĝis en 1934 en Somberek en la suda parto de Hungarujo. Lia familio estis senbienaj kamparanoj. Fininte sian mezlernejan edukadon en la urbo Pécs, li dediĉis sin al diversaj okupoj dum la sekvaj jaroj: laboristo ĉe ŝtata farmbieno, popoleduka prelegisto, direktoro de kultur-centro, radioparoladisto kaj eldoneja legisto.*

*Ĉe la komenco de la 1950aj jaroj liaj poemoj estis publikigitaj regule en transdanubiaj, poste ĉefurbaj, literaturaj periodaĵoj. Forte disciplinita formo kaj koncizeco karakterizas lian lirikon.*

*Liaj poemoj aperis ankaŭ en antologiaj kaj en apartaj volumoj, kaj li tradukis por antologioj versaĵojn de ĉinaj, polaj, rusaj, hispanaj kaj turkaj poetoj.*

## MAJSTRO ULRIK KAJ HENRIETTE

de Márton Kalász

Iun printempan tagon, Anna, la filino de pastoro Winterwild, etendis tolaĵon. La suno pace brilis, Anna kantis, kaj turdo akompanis ŝin per fajfado. Sur la monteto juna viro sintirante venis malsupren. Li ekaŭdis la kantadon, haltis kaj vidis la knabinon ekaperi inter la blankaj lavtinoj. Li trovis ŝin tiel bela, ke li gapis senvorte dum iom da tempo, poste metis sian pakaĵon sur la vojflankon kaj parolis jene:

—Ĉu vi permesus, fraŭlino, ke mi pentru vin?

La knabino venis pli proksimen, iomete ekzamenis la strangan ilaron, subridis kaj, ektirante la ŝultrojn, daŭrigis sian laboron, nature de tempo al tempo okulangule rigardante la junan viron. Tiu jam diligentege laboris.

Poste ankaŭ pastoro Winterwild pasumis tra la ĝardeno, ĉar jam dum iom da tempo li observis la agadon tra la fenestro. Li ĵetis rigardon sur la tolon, ne vidis sur ĝi ion alian krom koloraj makuloj, sed akirinte klerecon kaj sperton dum sia vivo, li nomis la junan viron majstro kaj invitis lin al tagmanĝo. Ĉe la krepusko li invitis lin al vespermanĝo, post vespermanĝo al tranoktado, kaj tiel la juna viro, kiu nomiĝis Ulrik, ankaŭ la sekvan tagon

povis pentri fraŭlinon Anna; kaj poste ankoraŭ dum pluraj tagoj, jen kiam ŝi brodis en la laŭbo, jen kiam ŝi etendis tolajon, jen kiam ŝi okupis sin en la ĝardeno.

La nura malbono estis, ke la bildo ne volis fariĝi preta. La majstro metis unu tolon post alia sur la stablon kaj same deŝiris ilin de la stablo. Li jam primeditis, ke hontigite, li diros adiaŭ al la familio de la pastoro.

Iun posttagmezon, en sia malespero li tiel parolis al la knabino:

—Vi estas tro vigla por mi, fraŭlino Anna. Mi ne povas pentri vin.

La knabino ridis.

—Ĉu vi povas pentri nur malspritan personon, majstro Ulrik? Kial vi ne iris en la kazernon al la musketistoj?

Ulrik impulsiĝeme translokigis la stablon.

—Mi parolis figure, fraŭlino. Sed kion vi povas scii pri tio, diru?

—Ba, ĉu vere? — la buŝo de la knabino restis malfermita. Paŭtante, ŝi klinis sian kapon. Ulrik volis diri ion konsolan al la knabino, por ke ŝi ne ofendiĝu.

—Mi opinias, ke vi estas tro bela. Tio estas la malbono. Pro tio mi ne povas pentri vin.

La vizaĝeto de Anna gajiĝis, kaj ŝi tiel parolis musvoĉe:

—Se vi nur vidus, kiel bela estas mia fratino, kiu nun ne estas hejme; ŝin vi tute ne povus pentri, se vi ne povas pentri min.

La peniko haltis en la mano de Ulrik.

—Ĉu via fratino? Kiel nomiĝas via fratino?

—Henri.

—Ĉu Henri? — miris majstro Ulrik. —Tiu ja estas virnomo.

—Nu, se vi ne lasas personon fini, kion li volas diri — fraŭlino Anna denove subridis. — Certe Henri. Mi volis diri Henriette.

Majstro Ulrik, promenante tien kaj reen en la ĝardeno, multe meditis pri tiu ĉi konversacio. La postan tagon li laboris entuziasme. Li sekvis la knabinon ĉien kun sia stablo kaj eĉ fajfis dum la trenportado. La pastoro de tempo al tempo staris malantaŭ lia dorso kaj kun plezuro vidis, ke la laboro antaŭeniras. Sed li observis ion strangan en la bildo. Li ne kuraĝis mencii tion; li sciis el siaj libroj, kiel malfacile estas sekvi la flugantan penson. Anna nur tion spertis, ke la pentristo jam ne rigardas ŝin per duone fermitaj okuloj; pli ĝuste li absorbiĝas en io super ŝia kapo kaj ridetas. Ŝi rakontis sian maltrankvilon al la patro.

—Ni ne povas kompreni, mia kara filino, tiun ĉi metion. Ĝi estas tute alia afero. Ni ne malkovras ĝiajn sekretojn; ni nur povas akcepti kaj ĝui la belegan rezulton.

Majstro Ulrik tago post tago fariĝis pli senvorta. Iun fojon fraŭlino Anna scivoleme alproksimiĝis antaŭ la tolo, kaj li demandis:

—Ĉu via fratino neniam venas hejmen?

—Jes ja. Ŝi venas hejmen ĉe la komenco de ĉiu somero.

Ulrik ne plu dormis en la domo, sed ekstere en la fojnejo de la remizo. Li ellitiĝas frue, li diris, ĉar tiutempe li plej bone laboras kaj li ne dezirus ĝeni la trankvilon de la familio. Cetere, li jam prefere retuŝas la fonon. La pastoro ĉiutagiĝe aŭdis lin iradi kaj zumkanti kaj li atentis la laboron kubutapogante sin ĉe la fenestro. La pentristo saltetis ĉirkaŭ la stablo kvazaŭ dancpaŝe. Per mallarĝa strio li pentris sur la bildo la flavaspektan borderon de sekalo sur la transa monteto, per reteca bluo li kreis la impreson de frua roso sur ĝi. Tamen li laboris plej multe super la portreto. Ĝi estis mirinda bildo. Ĝi similis al fraŭlino Anna, sed ne estis necesa sperta okulo por rimarki, ke ĝi tute ne estas la portreto de Anna. Ĝi ja estis pli bela, vere; sed estus malfacile diri, kiaspeca mistera radiado fluas el ĝi. Tiom oni povas senti, ke tiu ĉi radiado ne simbolas la karakteron de la fraŭlino.

Iun tagon aro da knaboj kure venis sur la vojo.

—Via pastra moŝto, — Ulrik aŭdis inter la foliaro de la pomarboj peze ŝarĝitaj de fruktoj. — Via pastra moŝto, Henri venas. Henri venas.

Post iom da tempo eniris ĉe la pordego du junaj viroj surportantaj larĝ-randajn ĉapelojn kaj vastajn vojaĝmantelojn. Unu el ili ĉirkaŭprenis kaj kisis pastoron Winterwild, la alia nur etendis la manon. Poste fraŭlino Anna sekvis, kaj ili ripetis la samon kun ŝi. Ili ridadis kaj forte brakumis unu la alian.

Majstro Ulrik silente paŝis al la pastoro.

—Ĉu vi ne havas ankoraŭ unu filinon?

—Ne — la pastoro respondis gaje. — Nur tiun, kiun vi pentras, kaj tiu ĉi estas mia filo. Li venas rekte de la Universitato de Lejdeno kun sia amiko.

La pentristo iris al fraŭlino Anna.

—Mi foriras. Mi devas serĉi Henriette.

—Sed tiun vi neniam trovos.

Obstinaj malgrandaj faltoj kolektiĝis ĉe la buŝanguloj de Ulriko.

—Almenaŭ lasu la bildon tie ĉi por ni — la fraŭlino petis.

—Kiel memoraĵon. Mi parolos al patro, por ke li pagu.

—Bedaŭrinde, ne estas eble. Mi scias, ke mi havas nenion, per kio mi povas danki pro la abunda gastamo. Tamen ne estas eble. Per tiu ĉi bildo mi rekonos Henriette.

La pentristo kolektis siajn aĵojn lasitajn dise en la ĝardeno, kunligis ilin per ŝnureto kaj kapklinante adiaŭis ilin.

Senvorte, bonhumore ekridante, ili rigardis post li, dum li malproksimiĝis kun sia pakaĵo surdorse, la bildo subbrake. Baldaŭ sur la supro de la monteto la tili-arbaro, tiel malgranda kvazaŭ manplato, englutis lian figuron.

Elhungarigis
*Eva* kaj *Bernard Golden*

Titolo de la hungara originalo: "Ulrik Mester és Henriette" el la volumo *Szép Szó Antologia*, Táncsics Könyvkiadó, Budapest, 1973, p. 90-92.

# UNU LARMO PRO LA HOMARO

—Sciencfikcia Rakonto—

J. Billón

Jam de kelkaj tagoj, lia senlaca vagado, serĉante iun personon ankoraŭ vivan, kondukis lin de loko al loko. Tamen liaj okuloj vidis nur la fruktojn de la Morto kaj la detruo. La granda urbo estis ne pli ol amasego da ruboj, da kadavroj kiuj ekputriĝis.

La fumo de kelkaj incendioj aldonis inferan ŝajnon al tiu senfina sorĉejo el morto kaj funebro. Konsumita, anhelanta, pro la laco kaj la densa atmosfero preskaŭ nespirebla, li paŝis malrapide tra inter la gipsoruboj, evitante la grandegajn kalcinitajn kraterojn per kiuj estis prisemita la urbo. Subite, li iĝis rigida, atenta. Sono jus alvenis en lian aŭdadon.

Senmove, li klopodis reteni la spiradon por, tiel, povi aŭskulti pli bone. La eĥo de murmuro alvenis ĝis li. Anksie li ekkuris al la loko de kie, li kredis, la sono devenis. Pro la urĝo, li stumblis en la ruboj kiuj amasiĝis sur tio, kio antaŭ nelonge estis la bone pavimitaj stratoj de granda urbo.

Finfine li atingis la lokon. Neniu! La realo disrompis la imagon, kiun li formis en sia cerbo.

La sono, kiun li aŭdis, estis kaŭzita de la disfalo de amaso da gipsorubo.

Triste, li rekomencis la marŝon. Li deziris foriri el la urbo. Estis senutile serĉi plu. Li estis sola. SOLA! SOLAAA!

Ĉi vorto traboris lian cerbon kiel akra stileto. Li estis sola por ĉiam.

La laco ĝenis lin, malvigligis liajn sensorganojn, kaj igis lin paŝi kvazaŭ ebria. Je la vesperiĝo li atingis la limon de ruboj de tiuj, kiuj estis ekstremaj kvartaloj de la urbo. Pene li grimpis sur tion, kio estis bela monteto plena de vegetalaro. Trankvila loko por amuzo de la loĝintoj de la detruita urbo. Nun, la fieraj arboj kuŝis tere, venkitaj de la samaj fortoj kiuj eliminis el la tera surfaco la estaĵon, kiu kreis ilin: la HOMO!

Elĉerpita, li lasis sin fali inter du egaj trunkoj. Lante li turnis la kapon al la detruita urbo kaj unu larmo pro la homaro perdita por ĉiam, unu larmo de doloro pro la fino de la amikeco, kiu dum miloj da jaroj kunigis la du rasojn, glitis sur lia fajna muzelo de fidela luphundo.

Elkastiliigo de: *LIVEN-DEK*

*Kiam mi atendis la ricevon de promesita artikolo por "Horizonto" fare de nia bona amiko kaj sindona esperantisto Juan Devis Calpe, prezidanto de la Grupo Esperantista de Valencia mi ricevis dolorigan sciigon: S-ro Juan Devis forpasis.*

*Memore al li, kaj omaĝe al lia senlaca laborado favore al Esperanto kaj ties humaneca internaciismo, mi aperigas verketon "Fiaskinta duelo", per kiu li gajnis premion en Literatura Konkurso de H.E.F., en la jaro 1964.*

I. Gastón

# *FIASKINTA DUELO*

Januaro, 1939a. Forpelitaj de la milito, el Katalunujo, okdek-mil rifuĝintoj de la hispana respublika armeo svarmas kvazaŭ en ŝafejo laŭlonge de tri kilometroj da strando ĉirkaŭbarita per pikildrato, en Saint Ciprien, Francujo.

La eksbatalantoj, kunigitaj en grupetoj, fosas kavojn en la sablo, etendas kaj fiksas toltegmentojn sur ili por sin ŝirmi kontraŭ la konstanta vento kaj eventualaj pluvoj. La irejoj inter tiom da truoj en la sablo similas verajn labirintojn, escepte de kelkaj stratetoj tradividantaj la koncentrejon en dek-ses apartajn kampojn, kaj la pompe nomata Granda Aveno paralela je la maro, inter la kampoj kaj la marĉo.

Multfoje, tre ofte, la francaj elektraj megafonoj la soldatojn insiste admonas al Kolonia Legio. Tiam aŭdiĝas obtuza brueto, kiu kontinue kreskas ĝis tia grado, ke ĝi fariĝas tondro. Miloj kaj miloj da gorĝoj kriegas samtempe: "For! For! For!..." ĝis la admonado mutiĝas.

Nek domoj nek barakoj staras ankoraŭ tie por la rifuĝintoj. Nur kelkaj lignaj barakoj por altrangaj oficiroj, kie ankaŭ la simplaj oficiroj kunsidas por babili.

——oOo——

En la barako de la artileria subkolonelo Pomer, estro de la deksesa kampo, kelkaj oficiroj ludas kartojn. "Nu, bone, — diras unu el ili al alia — nun vi ŝuldas al mi sep milionojn da pesetoj; mi nur du al kapitano Kastelo. Mi estas bonŝanca kaj eble hodiaŭ mi trinkos glaseton da vino je via kosto."

En tiu momento, eniras ridegante leŭtenanto Fuster kaj diras: "Jen mono! Freŝan, veran monon mi havas. Tuj mi

regalos vin per fromaĝo kaj vino. Ha!, kaj iomete da sablo, ĉar ni ne povas eviti ĝin... Granda vendisto, granda komercisto mi estas. Ha, ha, ha, ..." kaj pro ridado li ekpremas al si la ventron.

Ĉiu mire rigardas lin dum li ridas kaj fanfarone tintigas la monerojn en la poŝo.

Iom kvietiĝinte, li plu parolas: "Mi ĵus vendis tiujn botojn altajn je kvardek-kvin centimetroj. Ne vendeblaj, ĉu ne?

—Rakontu, rakontu.

—Dum la lasta kriegado de tiuj frenezuloj, mi iris promene kun la malbenindaj botegoj sub la brako, kaj rimarkante la naivan vizaĝon de unu el tiuj gigantaj Senegalidoj, mi ekpensis: "Ĝuste tiun nigran gardiston mi bezonas". Afable, kun mia plej alloga rideto kaj flataj vortoj mi salutis lin kaj ekmontris al li la botojn kvazaŭ ili estus trezoro. Kiel simplulo, la neklera soldato unue rigardis min, due la botojn kaj mi konstatis ke li komprenis min kiel bovo muzikon. Aj! Mia tuta franca vortaro ne helpis! Tiam, per mansignoj, grimacoj kaj multe da ŝultrofrapetoj, mi prosperis komprenigi al li mian celon. Estis tre amuze. Li komparis ilin kun la siaj, turnis kaj returnadis ilin suspektante ion neĝustan en la pintoj. Tamen li neniam priatentis, ke ambaŭ botoj estas de maldekstra piedo. Ha, ha, ha!... Jen la mono kiun li pagis: Kvindek frankoj".

—"Fulmotondro! — eksonas voĉego post Fuster — "Tio estas friponaĵo! Friponaĵo maldeca al oficiro. Via konduto devas ĉiam speguli la armehonoron, kaj vi makulis ĝin". Tiel parolas la subkolonelo Paniagŭa, kies ŝtaleca rigardo trapikas la gajan leŭtenanton.

—"Mi... mi... — turnante sin balbutas la surprizita junulo — mi... ne vidis vin,... mi ne volas ofendi... sed via moŝto devas konsideri ke... ĉi-tie... ni ja ne estas, fakte, militistoj..."

—"Eksilentu, leŭtenanto, — diras la severa subkolonelo — tio estas trompo, kaj ni kune iros redoni la monon al tiu kolonia soldato. Tio estas ordono! Antaŭen!"

La mieno de Fuster nebuliĝas. Tamen, ambaŭ kune eliras el la barako kaj du aliaj oficiroj sekvas ilin proksime.

Pro la oficiraj komentoj, subkolonelo Pomer kraĉas malŝate: "Galopatoro en ĉion ŝovas la flarilegon".

Ĉar Paniagŭa estas kavaleria subkolonelo, iama estro de la rajdlernejo, la sprita Pomer, moke, ĉiam nomas lin Galopatoro... kiam tiu forestas. Ĉar multe pli juna ol li, nur diskrete Pomer ridindigas sian grumbleman, pli aĝan kolegon, ŝerce parolante al li, ŝajne sen ofendaj vortoj. Tamen, tio ĝenas tiel multe la rajdiston, ke tiu eliras ĉiam ĉagrenite el la barako de Pomer.

Iu rakontas la malfeliĉon okazintan al povra Petro, soldato, militservisto de Galopatoro. Petro estas edzo, sed ankaŭ preskaŭ analfabeto. Al sia edzino li skribis leteron, per kiu li plendis pri ĉia mizero kian li travivas: Lakso, pedikoj, malsato, frosto, sableroj en la buŝo, okuloj kaj en ĉio pro la malbeninda senĉesa vento... Tamen, aŭdinte de sia estro, ke ne konvenas sciigi damaĝojn al la familianoj, ĉar tio nur senutile suferigas ilin, post cerbumado li ŝiris la leteron kaj sendis al ŝi alian kun tute kontraŭa enhavo. Troigante inventitajn mensogojn, li skribis ke li loĝas komforte kaj manĝas bonege, ĉiam kun sia amiko Ino, kaj estas preskaŭ feliĉa.

Sed sciu, ke tiu ino ne estis virino kiel oni povas konjekti, sed mallongigo de Inocenzo, samprovinca kamarado de Petro.

La respondo de la edzino dolore surprizis la edzon. "Se vi loĝas komforte ĉe amikino, ankaŭ mi ne malsatas, kaj de antaŭ unu semajno mi dormas kun Rafaelo, la panisto de la vilaĝo."

—"Nu, bone. Do, la danda ŝoforo Madriles ne estas, ja, unika en tia speco."

—"Ĉu unika? Kial? Kio okazis al serĝento Madriles?"

—"Okazis, ke... Bone, ĉiu el vi konas lin kaj scias ke li estas terura loganto de virinoj. Kiel la fama donĵuano, li delogis ĉian virinon, ekde aroganta princino ĝis humila fiŝkaptistino; ĉiu gustumis lian amon. Nu, bone... Do, okazis, ke ankaŭ li ricevis leteron, sed de sia amata bopatrino."

"Post la unua militatako al Madrid, lia bopatrino forveturis al urbo Valencia, ĉe alian filinon, kies edzo varbiĝis en la armeon. La edzino restis hejme tute sola, ĉar ili neniun filon havis. Bone, ni reparolu pri la bopatrino; ŝi skribis al li gratulante kun granda ĝojo pro la naskiĝo de lia unua, tre ĉarma filineto. Kia feliĉo, ĉu ne?! Nur mankas unu detaleto: Ŝi sincere ne sciis aŭ malice ignoris, ke li ne vidis la edzinon de antaŭ dek-ok monatoj."

Ĉiu ridas, ankaŭ la subkolonelo; tamen li diras: "Ne klaĉu tiom; pensu ke propran ĝibon neniu vidas".

Rigardante tra la pordo, unu el ili avertas: "Vidu, rigardu! Jam venas la leĝa komisiono kaj Fuster, malantaŭ la subkolonelo, manifestas petolemon; mi ne vidas la botojn, atendu, ili baldaŭ klarigos ĉion".

La foririntoj revenas silentante. Unue, Galopatoro, konfuzite; due Fuster, radiante, kaj la du oficiroj serioze, sed kun ridantaj okuloj.

La severa subkolonelo spiras brue. "Mi ne povas kompreni la teniĝon de tiu nigra soldato — li flustras penseme — tre bone mi eksplikis al li la tuton, sed li nenial volis repreni la monon. Li premis la botojn al si, kaj pro mia insistado li foririgis min; tamen mi ne opinias lin tiel stulta kiel Fuster... supozas."

Iu frapetas: "Subkolonelo Pomer... mia subkolonelo, ĉu vi enpermesas?"

—"Eniru, serĝento Kanuto; eksidu kaj parolu senĝene."

—"Mi volas diri nur, ke... estas je via dispono ĉi-tiuj kvindek frankoj."

—"Kial?"

—"Ĉar ĉi-tiu mono, vere ne estas mia.

En la kamiono, kiun mi komandas, restis du botoj utilaj al neniu pro grandeco kaj taŭgaj al neniu ĉar ambaŭ estis de sama piedo. Pardonu al mi ke mi vendis ilin ne petinte vian permeson. Misaginte mi ne kuraĝis malŝpari la monon, kvankam iom da malsato ne mankas."

—"Kaj, kial vi venas nun al mi?"

—"Ĉar mi aŭdis ke oni vendis alian similan paron..."

—"Nu, tio ne bezonas pardonon. Kun via mono iru manĝi kaj trinki je nia sano, aŭ eksidu; laŭ via plaĉo."

Dum tiu interparolo, la vizaĝo de Fuster konsterniĝas. Fine li demandas: "Diru, serĝento Kanuto, ĉu la botoj estas por dekstra piedo?".

—"Jes, mia leŭtenanto."

—"Kaj vi vendis ilin al tiu Senegalido, kiu nun staras garde en la unua elirejo?"

—"Jes, tiel estas."

—"Sovaĝegulo!... Pardonu viaj moŝtoj... Do, la kanibalo per malmultaj moneroj aĉetis du bonegajn parojn da botoj... Entute, vi serĝento trompis la negron, la negro trompis min... min, la plej lertan negociston..."

—"La plej grandan senhontulon! — eksplodas la rigora Galopatoro Inter vulpoj okazis la ludo kaj vi kaptis min kiel ŝafidon, por mia honto..."

—"Pro via entrudiĝemo, Galopatoro!! — rebatas Pomer — Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon, kaj de nun, ne ĝenu miajn oficirojn."

Fariĝas tomba silento. Eĉ muŝon oni ne povas aŭdi. Post momento, subkolonelo Paniagŭa kvankam kolere ruĝa, respondas mallaŭte, lante kaj aplombe: "Neniam antaŭe vi kuraĝis nomi min tia rekte al la vizaĝo. Kavaliroj, vi atestos... ĝis revido!!" kaj paŝon post paŝo la dignoplena figuro malaperas trans la pordo.

—"Sinjoroj, forgesu ĉion, — petas Pomer — jam estas tempo amuzi nin — rigardante el la pordo la rabadon de pano — De tago al tago estas pli malfacile al gardantoj rezisti la atakon de niaj malsataj knaboj."

Antaŭ la pordo, sub la barakombro, kelkaj el ili sidas kun la pugo sur la sablo. Aliaj kaŭras, la ceteraj staras. Tabakhavantoj fumas, sed tiuj feliĉuloj estas malmultaj. Eĉ ne unu tabakero restas en la poŝoj.

Kvankam vintre, l'aero ardas. Sufoka varmego premas la gorĝojn. Eble pluvos, malgraŭ la brulaj sunradioj. Multaj rifuĝintoj atendas la venon de l' kamiono, kiu proviantas panon. Ili promenas sur la "Granda Avenuo", kvazaŭ atendante nenion.

—"Jen, la kamiono jam venis, — plu parolas Pomer — kaj la knaboj, strategie okupas lokojn; rigardu, rigardu tiujn tri malaltajn knabojn! Bona taktiko!"

Ses altkreskaj ĝendarmoj, armite per kaŭĉulaj klaboj, staras garde sur kaj ĉirkaŭ la kamiono. Tri el la knaboj, aĝaj ne pli ol dek-ok jarojn, fojon post fojo incite provas elpreni panbulojn. Per rapidegaj moviĝoj ili evitas la batojn de la proksimaj gardantoj, dum tio alatentigas la ceterajn ĝendarmojn. En tiu momento, la aliaj kamaradoj alsaltas preskaŭ amase kaj prenas panbulojn. Kun ili sub la brako, ĉiu kuras, kuregas, kaj supersaltante kvazaŭ katoj trans la pikilan barilreton, malaperas en la fosaĵa labirinto. Ĉiu ne. Unu el la tri bravuloj, trafite de forta bato ne povas kuri. Pluvo da batoj plu falas sur lin. Nenio lin savos. Ĉu nenio?

Neatendite, okazas surprizego. Ekaperas majoro Fortea, la fortika Silentulo, kiu per surkapa pugnobato rapida kiel fulmo renversas unu el la batantaj ĝendarmoj. Li ekprenas lian klabon kaj svingante ĝin dekstren-maldekstren li ŝutas lavangon da batoj al policanoj nerezisteble, detrue kiel uragano.

La policanoj sesope ne povas haltigi lin; ili cedante retropaŝas, kaj venas la ĥaoso. La ĉiamaj rigardantoj, la promenantoj, kiuj neniam antaŭe partoprenis la rabadon, alsaltas la kamionon. Aliaj, de post la barilo, uzante la poŝtukojn kiel ĵetilojn, superŝutas la policanojn per sablo, por helpi la majoron. Ĉiu krias, sed aŭskultas neniun.

—"La kavalerio! La kavalerio! La maŭra kavalerio!..."

Efektive, kvar alĝeriaj kavalerianoj galope alproksimiĝas svingante la sabrojn. Same rapide kiel ĉio komenciĝis, tiel finiĝis. Ĉiu ekkuras for al sia truloĝejo kaj la brava impulsiĝema Silentulo ankaŭ fuĝas kaj rifuĝas... en la Oficejon de la Kolonia Legio. Tie, neniu riskus tuŝi eĉ la plej etan haron lian. De tiam, la kamiono ne plu eniras la "Grandan Avenuon".

——oOo——

La suno, fininte sian deĵoron, kaŝas sin trans la horizonto. La tero sternas super si nigrajn nubojn, kaj la vento turniĝas en alian direkton por blovi furioze. Jam ne ardas la aero; ĝi estas humida kaj iom post iom malsekiĝas. Tre malproksime la nuboj zigzage interŝanĝas brilajn fulmojn. La toltegmentoj pelate de la ventego, servas por nenio. Vane ĉiu penas tenadi ilin sur la kavo. La unuaj gutoj grandaj kiel kupraj moneroj, falas tie kaj tie-ĉi. Ĉiu volas ŝirmi sin kontraŭ la venanta ŝtorma pluvego, kaj ekkuras al la barako de sia subkolonelo; sed vane! Ĝi jam estas plenŝtopita. Dekoj da kamaradoj envenis jam kaj staras en ĝi kvazaŭ remburaĵo.

Pli laŭtan ol la bruo, oni aŭdas la voĉon de Pomer ordonantan: "Eksilentu! Eksilentu kaj cedu lokon al aliaj kamar...". Forta tondro dampas la lastajn silabojn.

Pluvegas, ekbrilas fulmoj kaj tondras senĉese. Multaj el ili rezigne foriras, ĉar de sur la tegmento l'akvo torentas. Kie do estas ŝirmejo? Nenie.

La kolera ŝtormo ekĉesas kaj malvarma pluveto anstataŭas la diluvon; la pluveto daŭras... persistas...

Trempite kiel ratoj en kanalo la bivakuloj vigle dismovas sin por ne frostiĝi. Unue ili laŭte sakras. Post duona horo ĉiu silentas. Pli poste... en la fundo de ĉies koro, eble humila kaj fervora preĝo... Ĉu eble? Ne, certe!

Unu horon post la alia, senorda kaj senluma procesio de fantomoj paŝas... paŝas... Pluraj pro afekcio en la pulmoj, ne revidos sian familion. Jes, pluraj. Terura kaj senfina nokto.

——oOo——

Kiel signon de espero, la matena krepusko anoncas la venon de la suno, kaj la pluvo, timigite ŝoviĝas al okcidento. Timide la taglumo heliĝas kiam ekaperas l'unuaj sunradioj kaj baldaŭ la reĝa astro montras sin simila al fritita ovo vidata tra inversita lorno.

La tuta koncentrejo similas grandegan akceptejon de tutmonda nudista kongreso. Miloj kaj miloj da nuduloj vidiĝas ĉie. Unu kantas, alia ridas, multaj ternas, sed ĉiu etendas sekige la ĉifonan uniformaĉon en la suna varmo.

La leŭtenanto Fuster, tute vestite, eniras en la barakon kaj zumas pro frosto. Brr...! Brr!... Ankoraŭ mi havas froston en la ostoj... La malbenindaj ĝendarmoj de l' enirejo de ĉi-tiu ŝafejo infera, hieraŭ nokte ne volis enlasi min en la domon de l' francaj oficiroj. Brr!... kaj troigante la frostotremon, diras:

—"Se mi kuraĝus malobei, la damnitoj, certe pripafus min. At-ĉis!! At-ĉiss!! Mi forte malvarmumis."

—"Kion do vi atendis de la ĝendarmoj, post la hieraŭa batado fare de l' Silentulo? Kaj krome, laŭ ilia opinio ni ja estas same oficiroj kiel ili estas episkopoj."

—"Oportune vi nomis la majoron — diras Fuster — Mi memoras ke li ricevis botelojn por la kuracado de sia astmo... Jen ili estas. Vidu, sur ĉiu botelo estas manskribite: Nur post la manĝoj. Ili estas senditaj el Elne, la najbara vilaĝo. Eble ili efikos kontraŭ mia malvarmumo. Sendube tiu medikamento havas aĉan guston, laŭ la kutimaj grimacoj de majoro Fortea .. sed ĉio estu por la amata vivo..."

Fuster ekprenas kuleron kaj plenigas ĝin per flava likvo. "Je via sano! Se mi mortaĉas, oferu multajn florojn al mia kadavro..." kaj li ekglutas la flavaĵon. "Eh?... Li ŝovas la langon sur la kulero kaj tuja rideto kurbigas liajn lipojn. Li relekas la manĝilon kaj subite, enbuŝiginte la botelkolon, glutas perunu tiro la tutan botelon.

—"Ho! Ĉu vi estas freneza?"

—"Ha, ha, ha!... Kia histriono, kia komikulo, estis la Silentulo!... Komedianto, hipokritulo, malbona amiko!" — patose grumblas Fuster —.

—"Nu, kio okazas nun? Jam de hieraŭ ni ne vidis lin, kaj la diablo scias, kien oni lin sendos... eble neniam plu ni revidos lin..."

—"Jes, vere; sed gustumu la medikamenton de l' aliaj boteloj. Ĝi estas siropo, fajna siropo el bananoj, citronoj, k. a.!"

Ne necesas diri, kiel longe la boteloj estis plenaj.

——oOo——

Du junaj francaj oficiroj solene iras viziti la subkolonelon Pomer; li etendas la manon al ili, sed ambaŭ ignoras la amikan intencon. Unu el ili diras hispane: "Sinjoro, ni havas la honoron esti komisiitaj de la kavaliro Paniagŭa..."

—"Ho! Jes, jes, de mia bona amiko Galopatoro..."

—"Ni ne scias lian duan familian nomon. Ni estas senditaj de li kiel sekundantoj, por inviti vin al duelo kontraŭ li..."

—"Ĉu al duelo? Bone, bonege; sed sciu, kavaliroj, ke se mi ne elektas la armojn, via kavaliro duelos kontraŭ mia bopatrino, ne kontraŭ mi."

—"Kvankam la komisiinto Paniagŭa estas la ofendito, li ja diris, ke vi mem elektu la armon. Tamen, ni devas trakti la duelon nur kun viaj sekundantoj..."

—"Konsentite. Jen kapitano Kastelo kaj leŭtenanto Fuster. Poste vi pritraktos la detalojn kun ili; sed nun, ĉar mi estas renoma pafisto, ni duelos ne per spado, nek sabro nek rapiro. Ni duelos..."

—"Ĉu per pistolo, do?"

—"Tute ne. Per kanonoj!!"

Tondras ĝenerala ridego. Eĉ la francaj oficiroj ridas, ridegas...

Se Paniagŭa aŭdus tion, Pomer nepre mortus... pro la eksplodo de Galopatoro.

*J. Devis Calpe*

## *LA INTERNACIA LINGVO EN GRAVA SCIENCA KONFERENCO*

Fine de novembro 1976 okazis en la Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn (FR Germanio) grava konferenco sub la titolo "Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo". La konferencon organizis la menciita instituto (direktoro Prof. D-ro Helmar Frank) en kunlaboro kun la laborgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvokibernetiko", kiun gvidas s-ro Hermann Behrmann.

Malgraŭ la misgvida titolo, la konferenco estis ĝenerale sur alta scienca nivelo kaj fakte pritraktis la nunan kaj potencialan rolojn de la Internacia Lingvo (Esperanto) en scienco kaj kulturo. Entute ĉ. 30 prelegoj pritraktis diversajn aspektojn de la jenaj kadraj temoj: 1. Lingvistikaj kaj Lingvo-Kibernetikaj Aspektoj; 2. La Internacia Lingvo

kiel Lingvo de la Estonta Internacia Scienca Kunlaboro; 3. La Internacia Lingvo kiel Instruaĵo; 4. La Internacia Lingvo kiel Bazo de Internacia Kulturo.

La oficialaj lingvoj de la konferenco estis la germana kaj Esperanto, sed unu prelego estis farita en la rusa. La prelegoj en unu el la du oficialaj lingvoj estis simultane tradukataj en la alian, kaj la tradukon oni aŭskultis en alia salono konektita al la prelegejo ankaŭ televide. Ĉar la tradukoj estis vere tre kontentigaj, oni povis senĝene aŭskulti ĉu la preleganton en la prelegejo, ĉu la tradukon en la alia salono.

Esperantlingvajn prelegojn faris, interalie, Prof. D-ro H. Frank, D-ro I.Szerdahelyi (Universitato de Budapeŝto), s-ro H. Sonnabend (prezidanto de ILEI), s-ro H. Behrmann, D-ro F. Pennacchietti (Universitato de Venecio), dipl. mat. H. D. Maas (Universitato de Saarbrücken), Prof. D-ro V. Mužić (Universitato de Zagreb), D-rino Magda Šaturová (Radio-Televido, Bratislava), s-ro C. Gacond (KCE, Svislando), Mag. A. Hrstić (Ekonomika Altlernejo, Split) kaj la subskribinto. Konsiderinda nombro da profesoroj kaj aliaj fakuloj el Germanio kaj el aliaj landoj prezentis siajn temojn en la germana.

Pro la tre granda nombro da prelegoj restis tro malmulte da tempo por diskutoj. En la fino de la konferenco viciĝis unu prelego post la alia, tiel ke diskuto tute ne povis okazi. Estis ankaŭ tre malfacile ĉeesti ĉiujn prelegojn, tiel ke ofte oni devis elekti laŭ la intereso, kiun elvokis ĉu la temo, ĉu la personeco de la preleganto. Feliĉe, ĉiuj prelegoj estos eldonitaj en formo de libro kaj nur tiam plene evidentiĝos la valoro de tiu abunda materialo.

Antaŭ la finiĝo de la konferenco Prof. Frank prezentis tri rezoluciojn. Kvankam mi plene konsentis kun la ĝenerala celo de la propono, mi tamen neniel povis akcepti la uzon de la termino "planlingvoj" (en pluralo) kaj de la obskura esprimo "interlingvistiko", pri kies difino eĉ ĝiaj protagonistoj ne povas interkonsenti. En tiu senco mi energie intervenis. Poste Prof. Frank kaj mi havis amikan konversacion, en kiu ni klarigis niajn respektivajn starpunktojn. Rezulte, en la rezolucioj nun estas farita klara distingo inter la Internacia Lingvo (Esperanto), vivanta kaj vaste uzata en la praktiko, unuflanke, kaj la multnombraj projektoj de komuna lingvo, neniam transformiĝintaj en vivantan lingvon, aliflanke. Cetere, pri tiu tuta demando de "interlingvistiko" kaj planlingvomanio baldaŭ aperos ampleksa artikolo en *Horizonto.*

*Ivo Lapenna*

### EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAĴOJ

## RETROSPEKTIVO PRI LA AGADO DE LA SOCIALE SANITARA SEKCIO DE LA UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO-ASOCIO (UMEA)

La 6-an de julio 1952 la tiama vicprezidanto de la Asocio de Ĉeĥoslovakaj Invalidoj (AĈI) Jos. Ed. Ambrož dissendis al la Esperanto-gazetaro informon pri la uzado de la internacia lingvo Esperanto en agado de la AĈI kaj pri la ebleco por ĉiuj esperantistaj organizoj eĉ unuopaj interesuloj, interŝanĝadi spertojn kaj kunlabori en la fako de ĉiaspeca zorgo pri invalidoj.

La 22-an de aŭgusto 1952 J. E. Ambrož dissendis al la Esperanto-gazetaro kaj al la unuopuloj, kiuj montris interesiĝon pri la afero la tekston kun resumo de problemoj de invalidoj en Ĉeĥoslovakio. Samtempe en aparta teksto "Per laboro al venko" li deklaris sian konvinkon, ke "per rezultoj de grava laboro en ĉiuj fakoj de la homa intereso, ni povos konvinki pri vivrajto de Esperanto eĉ la indiferentulojn kaj apatiulojn".

Sekvis vigla korespondado inter s-ano Ambrož kaj kelkaj interesuloj pri diversaj sociale sanitaraj problemoj, plejparte kunligitaj kun ftizo. La Medicina Revuo (jarkolekto 1957 p. 43) aperigis artikolon pri socialaj problemoj de ĉeĥoslovakaj ftizuloj.

La 4-an de aŭgusto 1959 en la kunveno de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA) en Varsovio J. E. Ambrož prelegis pri la graveco de aktiva partopreno de malsanulo en lukto por sia resaniĝo, kaj atentigis pri la graveco de solvado de liaj sociaj problemoj. Poste la Estraro de TEKA rajtigis s-anon Ambrož komenci agadon por sociala sanitara laboro en la TEKA-kadroj (Medicina Revuo, Decembro 1959 p. 36).

La afero evoluis tiel, ke la sekcio kontaktis parencajn organizaciojn en pluraj landoj, uzante la Internacian Lingvon. S-ro Ambrož kunlaboras ĉe la redakto de "Tribuno de Invalidoj", organo de la franca asocio de kriplulој. Ĉiuj artikoloj redaktitaj en Esperanto estas interesaj kaj disvastigindaj (Medicina Revuo, Decembro 1963, p. 10). Jen kelkaj el la temoj, pritraktitaj inter kunlaborantoj de la Sekcio ĝis la jaro 1963:

Defendo antaŭ kontraŭvola enspirado de la tabaka fumo; Kontraŭinfekta sekurigo okaze de ftizo ĉe kunlaborantoj de ftizuloj; Preferaĵoj por daŭre malsanaj — efika rimedo kontraŭ progreso de malsano kaj invalidiĝo, ankaŭ ilo cele al sanitara disciplinigo de malsanuloj. Plue estis prezentitaj al la Sekcio la problemoj: Koncepto de la vivnivelo; Sociaj konsekvencoj de la plibonigo de la homa vivo; Homa rajto al liberiĝo de la vivo (rajto de eŭtanazio).

En la plua agado de la Sekcio estis eluzitaj ankaŭ informoj, kiujn akiris ĝia komisiito en sia funkcio de vicprezidanto de la Ligo de ĉs. Invalidoj. Li partoprenis kelkajn internaciajn kongresojn, ekz. la Kvaran Mondkongreson pri Vivkondiĉoj kaj Sano en Karlovy Vary de 2-5.9.65, la Nacian Kongreson de la Germana Asocio por Rehabiligo en Weimar (G.D.R.) en 1966, la Trian Psiĥiatrian Kongreson en Brno (ĈSSR) en 1966.

Ankoraŭ en la jaro 1972 en la Sekcio efektive aktivis 16 gekunlaborantoj el 10 landoj, kvankam la listo de gekunlaborantoj enhavis 75 nomojn el 23 landoj. Supozeble, la kaŭzo de tio estas la perdo de pacienco pro manko de efektivaj rezultoj en problemoj, kiuj speciale ilin interesas. Aperis pluaj problemoj: Solvado de socialaj demandoj de ftizuloj, kiuj estas laŭleĝe devontaj submeti sin al longdaŭra hospitaligo; finanza ŝtata helpo al familianoj, kiuj zorgas pri siaj invalidaj parencoj; kreskanta misuzado de drogoj.

En la periodo 1973/1974 la aktiveco de la Sekcio restis senbazaj ŝanĝoj, kvankam la nombro de aktivuloj malaltiĝis. En ĝia laŭprograma agado plejparte reaperis la problemoj, kiuj estis jam pritraktitaj. Unuopaj demandoj temis, plue, pri la ebleco sanigi malpuran vivmedion helpe de aparato produktanta jonojn kaj pri organizaĵo de gemalsanuloj kun mjela sklerozo.

Montriĝas, ke por plua funkciado de la Sekcio estas dezirinde disvastigadi informojn pri ĝia funkciado kaj renovigi ĝian organizan reton (MIR decembro 1974, Vol. 6-a, N-ro 2, pĝ. 38-39). La nuna gvidanto de la Sekcio, fariĝinte dume pensiulo sen la iamaj eblecoj teknike-administraj, financaj k.t.p. opinias utila por la afero mem, ke li estu anstataŭigita. Ĝis tio okazos li ja plenumos la funkcion laŭ siaj modestegaj eblecoj, nesufiĉaj por dezirinda prospero de la Sekcio, sed li ree petas ĉiujn interesulojn deklari al lia adreso (Jos. Ed. Ambrož, Špačkova 3, 63600 BRNO, Ĉeĥoslovakio) sian intereson kaj sugestojn por plua agado de la Sekcio.

## KION VI NE LEGOS ALILOKE

Al D-ro H. Tonkin,
Prezidanto de UEA,
5 Violet Lane,
Lansdowne, PA 19050
Usono

Soest (Nederlando), 4 decembro 1976.

Estimata sinjoro Tonkin,

Mi ankoraŭ revenas al via letero de 2 novembro, ne por ricevi vian respondon — viaj respondoj kun la atendeblaj elturniĝoj ja apenaŭ interesas min — sed por difini kaj emfazi kelkajn nudajn faktojn por la posta historiografio de la Esperanto-movado. Nigraj tempoj ja regule okazas en ĉiuj sektoroj de la homa socio (la homaro ja tiel-tire staras dorse kontraŭ la muro), sed estas necesa prilumi faktorojn kiuj kondukis al reakcio kaj nigreco aŭ akompanis ilin. Krome estas interesa ekscii kiel spertis kaj digestis la situacion la samtempuloj kaj kunaktoroj.

1) *Ankoraŭfoje...*

En 6.5.76 la nederlanda sekcio de Amnesty International proponis al CO de UEA distribui ĝian — de mi verkitan — esperantlingvan informilon en la kongreso en Ateno. En 17.5.76 CO telefone diris al Amnesty ke la kosto de distribuo estos 160 guldenoj. Se Amnesty — laŭ la telefona komuniko — konsentas pri tiu kosto, CO submetos la aferon al la estraro por aprobo. Do CO *antaŭe* kondiĉis pagon de 160 guldenoj kaj eĉ ne unuvorte aludis la eblon de senkosta distribuo. En via letero de 11.10.76 vi i.a. skribas: "Se la propono de AI dekomence enhavus peton pri senpaga distribuo, kompreneble pri senpaga distribuo voĉdonus la Estraro". Tio estas la supro de hipokriteco, eĉ senkonsidere al tio ke UEA estus devinta tute spontane proponi tiun etan servon al Amnesty (la minimumon kiun oni povus fari), sen ŝima, etanima serpentumado pri monsumo por la distribuo de informilo serve al la homrajtoj. Tiu ĉi okazaĵo klare karakterizas la mensostaton de la nunaj "gvidantoj" de UEA, eta, sensignifa organizo, kiu konstante regresas kaj vegetas en izoliteco, for de la reala kaj aktuala vivo. Mi aldonu ke Sennaciulo publikigis pri Amnesty, dum Komuna Gazeto (Nederlando) en sia novembra numero presigis la Amnesty-informilon sur la tuta frontpaĝo, kompreneble senpage.

2) *Plagiato*

*Enkonduke.* En via letero de 2.11.76 vi i.a. diras "ke prof. Lapenna bone scias, ke "UEA utiligas la *CED-dokumentojn* en siaj nunaj dokumentoj. Por *Esperanto en Per"spektivo* li mem utiligis tiujn fontojn".

Mia demando: kiu verkis la CED-dokumentojn? Certe ne iu institucio, eĉ ne Dio mem aŭ iu eksterhoma forto sed, laŭ mia informiĝo, preskaŭ tute Prof. Lapenna. En la praktiko Prof. Lapenna estis CED kaj CED estis Prof. Lapenna. Kaj vi, sinjoro Tonkin, tute bone scias tion, sed vi evidente ne disponas la sciencan konsciencon agnoski tion, male, vi tute ne mencias la nomon de Prof. Lapenna. Ja vi kaj via klubo intence kaj laŭplane klopodas obskurigi kaj treti la honoron kaj grandan laboron de homo al kies plandoj

vi intelekte, kaj mi timas ankaŭ morale, eĉ ne atingas. La laboro de Prof. Lapenna evidente estas tiel grandmerita ke oni nur povas imiti ĝin. Legante paĝojn 113-115 en Horizonto, mi vidas la nunan UEA-"kremon" verme zigzaganta tra la sterila Esperanto-budo kaj fuŝanta, por glori sin mem. (Historia anekdoteto interkrampe: Wensing, via kamarado en la estraro, iam "kortuŝe" rakontis al mi ke en sia junaĝo li estis talenta violonludanto kaj kutimis ludi grandajn koncertojn. Nun mi emas kredi ke li eĉ ne povas *agordi* violonon, ĉar li ne povas sonigi purajn tonojn). Vere, ĉapitro pri senskrupuleco kaj blufo certe devos havi lokon en posta historiografio de la Esperanto-movado.

*La doktora kreo*

En Esperanto en Perspektivo, p. 350, troviĝas parto pri Parizaj radio-elsendoj en Esperanto. Poste ankaŭ vi skribis (ne verkis!) tiuteme en t.n. "Dokumentoj", p. 2-3. La du tekstoj estas komparitaj sur p. 114 de Horizonto. Nu, mi kiel multjara jurinta tradukisto ankaŭ pri Esperanto plej emfaze deklaras ke via teksto estas enhave tute identa al la teksto de Prof. Lapenna en EeP. Vi neniurilate aldonis ion novan al la jam ekzistanta Lapenna-teksto, tiel ke via skribaĵo esence estas plagiato. Vi enhave tute superflue transskribis ion, ne el naiveco, sed konscie. Tio estas tiom pli ridindiga, ĉar pri vi mem vi grave diras ke "vi devas koncentri viajn fortojn je plej esencaj taskoj" kaj ke "pro premo de pozitiva laboro" (sic).

Analizo de plagiatoj troviĝas sur paĝoj 113-115 de Horizonto (1976). La supro de absurdeco kaj insolenteco estas ke UEA, do aankaŭ vi, anoncas tiun mizeran imitismon kiel "Kompletigon de Esperanto en Perspektivo" kaj kiel "...suplementon de tiu grava manlibro" (= EeP). Vidu pri tio p. 3 de "Esperanto" (1976). Skrupuloj pli kaj pli maloftiĝas en Esperantio, kie kreskanta nombro da homoj sin sentas kiel "la hundo kiu saĝas post la vundo".

Denove mi donas konsilon al vi: reiru al la universitataj benkoj kaj klopodu ankoraŭ akiri sciencan metodikon, kiu aŭtomate implicas objektivecon kaj honestecon.

3) *La verda buŝumo*

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la apoteozo en via letero de 11.10.76 ke "en UEA regas multe pli grandaj eblecoj je libera esprimiĝo ol mi (= Munniksma) eble konscias".

En mia respondo de 19.10.76 mi pledis por libera polemikado en "Esperanto" kaj Horizonto, por doni al la anaro almenaŭ la eblon orientiĝi kaj memstare formi al si juĝon surbaze de la faktoj, sed vi lerte evitis tiun demandon.

Sur paĝo 45 de Horizonto (1976) vi povas legi la nomojn de elstaraj esperantistoj kiuj jam viktimiĝis al la cenzura gilotino de tiu areto da singloraj filistroj en "Esperantio". La esperanto-popoleto do ankaŭ konas siajn cenzuristojn kaj ilin eĉ lakee lekis iu sinjoro Milojeviĉ, nome sur paĝo 23 de "Esperanto".

En decembro 1975 Prof. Lapenna eksiĝis el la membreco de UEA. En sia letero de 24.12.75 li argumentas kaj motivas tiun eksiĝon, donante abundon da, iafoje, ŝokaj faktoj. Li interalie skribis: «(...) Samtempe estas enkondukita *totaleca cenzuro*. La nuna »gvidantaro rifuzas publikigi ne nur mian eksiĝan tekston kaj miajn artikolojn *reage* »je nete misprezentaj asertoj publikigitaj en la organo de la Asocio, sed ankaŭ nom»bron da leteroj kaj protestoj, senditaj de aliaj membroj. Eĉ pli ŝoke: la redakcio de »"Esperanto" kaj 2-3 satelitaj organoj ne nur rifuzis publikigi miajn *reagajn* tekstojn »kun korektoj pri faktoj, sed eĉ polemikis kun tiuj nepublikigitaj tekstoj kaj malice »deformis ilian sencon.»

Prof. Lapenna membriĝis al UEA en 1930, do kiam vi, sinjoro Tonkin, ankoraŭ ne sidis en la utero (mi supozas tion). En 1937 li iĝis membro de la Komitato kaj en 1938 de la estraro. Li restis membro de la Komitato kaj de la estraro ĝis julio 1974. Liaj meritoj por Esperanto kaj la esperanto-movado estas nekontesteble ege grandaj, eĉ senrigarde al lia scienca famo sur kampo profesia, el kiu la movado ankaŭ profitis. Dum la dua mondmilito kontraŭ la bruna submondo li kiel Partizano perage batalis por la nuda libereco; denove: kiam vi ankoraŭ ne antaŭ longe forlasis la vindotukojn. Kaj al tiu homo vi kaj via klubo eĉ ne donas la eblon defendi sin kaj diskonigi faktojn kiuj pleje gravas por la higienigo de la movado! Vere, altan arbon batas la fulmo, ĉikaze la etuloj. Tiu detenado de informoj for de la amaro simple estas krimo, kiu apartenas nur al diktaturaj reĝimoj. Per ĝi vi kompreneble montras nur vian propran moralan malforton.

Sed por mi plej naŭza kaj malfacile digestebla estas la fakto ke ĉi tiu UEA-makulo de cenzuro spiras en la atmosfero de la Nederlanda demokratio, ke ja via klubo profitas el tiu demokratio por likvidi ĝin por aliaj homoj. Dum la okupacio de Nederlando fare de la Germanaj nazioj ni amare spertis kiom terura estas la manko i.a. de libera informado, tiel ke ni sopire kaj avide legis la subteran gazetaron kaj aŭskultis la malpermesitajn radio-informojn el la libera mondo. Kaj nun tiu klubo de despotetoj verdaj, kun sia centra budo en Rotterdam, kiuj sur Nederlanda grundo malrespektas malnovan, enradikiĝintan tradicion, nome tiun de esprimiĝolibero, produktante revuon en kiu la voĉo de opozicio kaj kritiko ne povas aŭdiĝi, kiel montrite. Kion pri tio pensas ekz. Prof. Støp-Bowitz, kiu ja certe vive memoras pri iu Quisling, aŭ D-ro Denoël, kiu iam

skribis al mi ke li partoprenis en la rezisto-movado kontraŭ Hitler, ke li estas rekonita "armita partizano", kaj ke li estas ĝisosta malamiko de ĉia perforta premo. Li konsciu ke cenzuro estas kria formo de tiu "perforta premo". Li nun havas eblon montri ke li seriozas rilate al libero! Kial UEA ne translokas sian entreprenon al lando kun totaleca reĝimo, kio ja estus pli sincera kaj honesta! Krome oni tiam havus ŝancon pri ŝtata subvencio. Ekzistas abundo da diktaturoj kaj duondiktaturoj, do oni povus elekti laŭplaĉe. En Nederlando ni jam havas sufiĉe da problemoj pro militkrimoj kaj aliaj "heredaĵoj" el la milito, kiam tiraneco triumfis. Ni nepre ne bezonas opinisubpremajn gazetetojn, eĉ se ili estas apenaŭ konataj kaj redaktataj en la Internacia Lingvo.

Do UEA, malaperu el Nederlando kaj revenu nur kiam viaj okuloj denove direktiĝas al la libereca, humanisma tradicio de Zamenhof, kiu mem dolore suferis pro sklavigo de l' homa spirito.

Bondezire,
*F. Munniksma* (Nederlando)

## MALLONGE

Sub la titolo: "El día del libro esperanista" (La tago de la Esperanto-libro), en la ĵurnalo "El Día" (La Tago) de Santa Cruz de Tenerife (Kanariaj Insuloj), aperis artikolo de Prof. Dro. Juan Régulo Pérez, pri la verko "El Esperanto" de Pierre Janton, en hispana versio.

Mi ne intencas komenti la libron nek la artikolon. La intereso de la libro kaj la kompetenteco de ties aŭtoro estas de ĉiuj konataj, kaj pri la artikolo, kion diri? Sufiĉas legi la nomon de la aŭtoro por scii kia ĝi estas. Sed mi kaptas la okazon por ion aldoni: Mi estis informita pri la apero de la libro, dek tagojn post ĝia prezento en la librejoj de Zaragoza, ne pasis unu monato kiam ĝi estis elĉerpita en la ĉi tieaj vendejoj, kio elmontras la intereson, kiun Esperanto vekas.

### KONKURSO "FUNDACION ESPERANTO"

Por plej bona kultura laboro dum 1975) Konsente kun la decido de la Patronaro de "Fundación Esperanto" la premioj estis aljuĝitaj laŭ informoj aŭ raportoj de laboro aperintaj en "Boletín de HEF"-1975, kaj aliaj revuoj.

1 Pro unuanima decido gajnis la 1-an premion "Fundación Esperanto" la Hispana Esperanta Junulara Sekcio (HEJS).

1 Malgraŭ sia malsama laboro, du Grupoj meritis la 2-an premion "Francisco Máñez". Do, anstataŭ disdividi la premion, la Patronaro de Fundación Esperanto decidis aldoni plian duan premion sub la nomo "Fundación Esperanto" 2-a premio. Tiuj du premioj estis aljuĝitaj al Grupo "Fido kaj Espero" de Valladolid kaj al "Centro de Esperanto Sabadell" respektive.

*Inés Gastón*
Sekretariino

### ESPERANTO NE ESTAS ARGILO

Sub la supra titolo aperis en "Esperanto" n-ro 3-1976, p. 52 mia protesto kontraŭ aperigo de versaĵoj de Edwin de Kock kaj similaj. La "poetaj liberecoj" de tiu sinjoro kaj uzataj de li nekutimaj lingvoformoj estas kontraŭ la fundamento de Esperanto kaj la spirito de la genia kreaĵo de Zamenhof.

Nun mi protestas kontraŭ aperigo de la poemo de la sama aŭtoro sur la paĝoj de "Horizonto", n-ro 6-1976.

Refoje indigne, averte kaj proteste mi vokas: ESPERANTO NE ESTAS ARGILO EL KIU ĈIU POVAS KAJ RAJTAS MODLI KION LI (ŜI) VOLAS!

En novembro 1976.

*Mag. Isaj Dratwer*, Israelo

### LA KAZO ŜWISTAK

Laŭ fidinda informo ricevita el Pollando, s-ro S. Ŝwistak, estrarano de UEA pri informado kaj turismo, estas eksigita el prezidanteco de Pola Esperanto-Asocio.

Sub lia regado la sinceraj esperantistoj en Pollando devis multe suferi. En 1974 li likvidis la tre aktivan Fervojistan Asocion de PEA (detalojn v. en *Horizonto* 1/1976, p. 20). Laŭ lia ordono, la Vroclava Filio de PEA troviĝis dum tri jaroj "sub kuratoreco de la Oficejo pri Internaj Aferoj", kvazaŭ ĝia membraro konsistus "el krimuloj" (esprimoj uzitaj en la informo).

S-ro Ŝwistak estis unu el la partoprenintoj de la politika konspiro en UEA. En 1973 li estis akceptita kiel komitatano A de UEA, evidente kontraŭstatute, ĉar li ne estis MA de la Asocio dum minimume tri jaroj, kiel preskribas art. 30 de la Ĝenerala Regularo. Rezulte de la hamburga puĉo li estis elektita, same kontraŭstatute, estrarano de UEA kaj tuj komisiita pri unu el la plej gravaj agadbranĉoj de la ĝishamburga UEA, nome pri la monda informado, pri kiu laŭstatute respondecas la ĝenerala sekretario de UEA (art. 30). Do, unu kruda malobservo de la Statuto post la alia.

Ne estas surprize, ke sub tia gvidantaro de UEA, ankaŭ "la monda informado pri Esperanto" plene kolapsis kaj en la Estrara Raporto por 1974/75 oni povis legi "raporton", absolute unikan en la historio de UEA, ke "raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin" (p. 13). Tia homo, kiu, pro troa politika "fervoro" kaj misuzo de pozicio, fariĝis malakceptebla eĉ por la polaj aŭtoritatoj, tamen plu troviĝas en la nunaj "efikaj" Komitato kaj Estraro de UEA, kie li plu "prizorgas la mondan informadon pri Esperanto".

# TRA LA ESPERANTO GAZETARO

KOMUNA ESPERANTO-GAZETO, organo de Federacio de Esperanto-Organizajoj en Nederlando, regule publikigas tutajn paĝojn da oficialaj jarraportoj kun detalaj kontoj de la tri asocioj, kio okupas tro multe da spaco kaj povus facile esti komunikita al la respektiva membraro alimaniere. Kelkfoje troviĝas interesaj eroj. En la decembra n-ro (p. 135) pensigaj estas la konstatoj, ke "neniu el la unuiĝoj estas forta, aktiva, iniciatema" kaj ke "mankas aktivuloj... forestas kunlaboro en ekspozicioj, rilate Esperanto-kursojn kaj propagandon". "Ĉu mirinde", skribas W. Krikke, "ke de temp' al tempo iu forlasas la vicojn de aktivuloj" kaj ke estas aliaj, kiuj "serioze pripensas iel retiri sin, parte aŭ tute, pro elreviĝo...".

Efektive, en Nederlando, kiel alilande, tre valoraj aktivuloj elreviĝis kaj retiriĝis pro la ŝokaj eventoj en UEA, en kiuj ĉefrolis ankaŭ la nederlanda triopo Wensing-Woessink-Boersma, sed tion W. Krikke ne menciis.

——oOOo——

Kontraste, BRAZILA ESPERANTISTO, dum kelka tempo enhave tre pala, subite fariĝis pli interesa kaj pli vigla, verŝajne spegulante la reviglîĝon de la tradicia Brazila Esperanto-Ligo, sendependa neŭtrala organizaĵo, nun ekster UEA. Leginda estas la artikolo de la redaktoro Luiz A. B. Martins, samtempe prezidanto de BEL, pri la nuna stato de la brazila Esperanto-Movado (julia/septembra n-ro 1976). La aŭtoro bedaŭras la ekziston de "tri samcelaj societoj sen difinitaj agadkampoj", ĉar tio "portas malutilon al la nacia Movado" kaj "ni ekperdas la akirojn atingitajn de la eminentaj sindonaj antaŭuloj ĝuste kiam nia lando prezentas favoran kondiĉon por la disvastigo de Esperanto". En la oktobra/decembra n-ro 1976 troviĝas instiga artikolo en la portugala "Kiel bone informadi", bazita sur la *Principaro de Frostavallen* kaj sur la artikolserio de prof. I. Lapenna "Por pli efika informado", publikigita en la organo de UEA inter 1970 kaj 1973. Ni nur atentigas la aŭtoron, ke la tuta serio aperis en 1974 en formo de broŝuro kiel eldonaĵo de la tiama Informa Fako de UEA kun Antaŭparolo de G. Becker, la tiama ĝenerala sekretario de UEA. Al tiu artikolo pri informado estas ligitaj la "Notoj pri instruado de Esperanto ĉe BEL", prezentitaj kiel bazo por diskuto al Simpozio de BEL en julio 1976. La Simpozio ekzamenis la diversajn instrumetodojn kun la celo trovi la plej taŭgan por instruado de Esperanto al brazilanoj.

——oOOo——

THE AUSTARLIAN ESPERANTIST, unu el malmultaj bone redaktataj organoj de landaj asocioj, publikigis en n-ro 9/76 vere instruan artikolon "Mia esperantistiĝo" de Trevor Steele. En ĝi li prezentas siajn spertojn, kiuj pliân fojon montras, ke primitiva "propagando" por Esperanto kompromitas la lingvon kaj fakte malproksimigas ĝin de la "varbotoj", precipe de kleraj personoj. Partopreninte fuŝlecionon de s-ino X, lia franca kolego en la lernejo "ekelpensis ĝentilan ekskuzon por malakcepti la sekvontan inviton de s-ino X" kaj "ankaŭ la geknaboj neniam ĉeestis duan fojon... El ruinoj de tiu fiaska Esperanto-Klubo leviĝis fine nur unu esperantisto: mi". Kaj li fariĝis esperantisto, ĉar en 1970, ellerninte iomete la lingvon, li vizitis la Londonan Klubon: "Prezidis D-ro Wells, gastparolis Prof. Lapenna, kaj multaj aliaj montris sin alte kapablaj". Por la aŭtoro tio estis "memorinda vespero", kiu kuraĝigis lin partopreni la UK en Vieno. Tie li vidis "propraokule, ke Esperanto estas vere tuthomara komunikilo, ne mur agrabla hobio aŭ esotera ludilo por sekto da lingvemuloj" kaj "mi jam fariĝis esperantisto".

Sed tio estis en Vieno! Pri la UK en Ateno raportis en la sama n-ro Ken Linton, la ĉefdelegito de UEA por Aŭstralio. Li skribas: "Mi ne intencas polemiki pri la hamburga afero, ĉu Lapenna pravis aŭ ne, sed mi ĝojas raporti, ke post avida serĉo en Ateno mi ne povis trovi ian ajn signon de malamo al nia prezidinto". Fakte, kial necesis "avide serĉi" en Ateno, se oni povas trankvile legi en Hamburgo en Retrospektivo, sen kia ajn polemikado, pri multaj faktoj, sidante komforte en hejma apogseĝo? Kaj kie en Ateno? Ĉu en ĝiaj stratoj, aŭ en la Komitato de UEA, aŭ inter la ordinaraj kongresanoj? Kaj se inter la ordinaraj kongresanoj, ĉu vere la raportanto povis atendi, ke *tie* li trovos "ian ajn signon de malamo" al Prof. Lapenna? Li daŭrigas "Aliflanke mi ne povis ne admiri la lerton kaj justan manieron, laŭ kiu nia nuna prezidanto prezidis la komitatkunvenojn". Ŝajnas, ke prezidado de politike "kuplita" kaj tial komplete senkritika komitato fariĝis la plej alta kvalito, aparte menciinda en la nuna UEA, ĉar la cetera parto de la "raporto" rilatas al siestoj kaj horoj de vespermanĝoj, al la tritaga krozado kaj al veturo tra Eŭropo, cetere sufiĉe viveca priskribo de la vizititaj landoj, sed sen kia ajn rilato al la UK.

——oOOo——

Ankaŭ la n-roj 77, 78 kaj 79 (1976) de DER ESPERANTIST, eldonata de la ŝtata-partia institucio Kulturligo de GDR, kies Laborrondo nun estas "aliĝinta asocio" de UEA, estas plenaj de partipolitika propagando, lerte intermiksita kun artikoloj kaj informoj pri


Esperanto. La periodaĵo estas senpage distribuata propagandcele en diversaj internaciaj kaj landaj konferencoj aŭ alispecaj renkontiĝoj. Tio estas rajto de ĝiaj eldonistoj, ĉar ĉiu povas utiligi la lingvon por kiu ajn celo, inkluzive partipolitikan propagandon. La granda diferenco estas, ke pli frue DER ESPERANTIST troviĝis *ekster* UEA, dum nuntempe ĝi estas organo de partipolitika instanco aganta *en* UEA kaj eĉ reprezentita *en ĝia Komitato*, kio aldonas plian pezon al la partipolitika kompromitiĝo de tiu Asocio ekde Hamburgo.

---

*Noto:* Ni ricevis bondezirojn de konata esperantisto en Ĉekoslovakio. Li aldonis: "Veras ĉio, kio estas skribita sur paĝoj 143-144 de "Horizonto!" La redakcio kore reciprokas.

Elstara esperantisto el Bulgario skribis, ke Horizonto regule atingas lin kaj aldonis: "Mi pasie legas ĝin".

---



HORIZONTALE

1. Itala muzikisto (1867-1957).
9. La fino de la peritoni'.
10. Tie oni rimarkas la svelton.
12. La urbo de la miela luno.
14. Dram' sur celulojdo.
15. La hasta solvo se mankas la vizo.
16. Suferont' de ago.
17. Itale mi ne scias kio.
18. —— me tangere.
19. Vortfiguro.
21. La malbela frat' de la rano.
23. Unu el la ektimoj de Mahé (radiko).
25. Fabela infanmanĝanto.
27. Ĝi karigas la patron.
28. La plej mallonga adjektivo.
29. Ina adolesk'?
30. Rilata *la vojon* inter la *arboj*.
32. La urb' de la kanaloj.
33. En Francujo ĝi povas esti grasa tago.
35. Tri vokaloj, sed ili sumiĝas al unu.
36. Opero de Bellini.

VERTIKALE

1. La urbo de la vermutoj.
2. La sufikso de la libro de Gjivoje.
3. La loko de la valeza-piemonta tunelo.
4. La rivero de Florenco.
5. La paseo de 16 h.
6. Origino de la benzino.
7. Tiuj.
8. Ĉefurbo.
11. Parto de la koksosto.
13. Moviĝi.
16. Hom' sen gepatroj.
19. Sonorilej' ĝi povas esti.
20. Etulon.
21. Serpent'.
22. Radframoj lokomotivaj.
23. Bulbe parfumita.
24. Indulga sen in', turnu kaj glatigu.
25. Fine la samoan mi parolas sen simil'.
26. Rezonkapablo.
27. Eŭropa antilopo.
29. Aroma herb'.
31. Agroskrapad'.
34. Brilas la poro sen la rivero (Radiko).

---

LA POŜTMARKKLOLEKTADO

Ni kore dankas al la 30 esperantistoj, kiuj sendis poŝtmarkojn en 1976. Per tio ni enspezis 1084 d. kr. Tiun monon ni aldonis al *Garantia Fondaĵo*. La 31-an de decembro 1976 tiu konto faras 2700 d. kr. Ni dankas precipe al s-ino *Sirkku Koivu*, Finnlando, s-ro *A. Garcia Breque*, Argentino, d-ro *André Vedrine*, Francio, s-ro *Mihail Petre Dungeanu*, Rumanio kaj al s-ro *H. Schikschneit*, Germanio.

Daŭre akceptos viajn poŝtmarkojn s-ro Peter Zacho, Amosevej 5 A, 2700 Brh. Kopenhago, Danlando.

# 3-A INTERNACIA KONFERENCO
# DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

*Humlebæk, Danlando, 23-30 julio 1977*

Korespondadreso: cand. oecon. H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando

*Oficiala Informilo n.º 3*

Sube oni legos ne nur novaĵojn. Konsiderante, ke per tiu ĉi numero de *Horizonto* komenciĝas nova jarkolekto, por kiu envicigis sin novaj abonantoj, la Organiza Komitato opinias necese ripeti kelkajn el la informoj donitaj en la antaŭaj numeroj.

*1. Konferencejo.* La ideala kadro de la konferenco estos la *Altlernejo Krogerup* (dane: Krogerup Højskole) en Humlebæk tuj apud la bordo de la markolo Sundo (inter Danlando kaj Svedio), 36 km norde de Kopenhago kaj 8 km sude de Elsinoro. La tiea regiono, Norda Selando, estas unu el la plej ravaj partoj de Danlando kun arbaroj, lagoj, fekundaj kampoj, kasteloj kaj idiliaj vilaĝoj. Laŭ la norda bordo, ĉe la maro Kattegat, etendiĝas sablaj banstrandoj.

La altlernejo situanta en bela naturparko havas kiel centron la palaceton de Krogerup, konstruitan en 1779, kies interno estasbone adaptita por altlernejaj celoj. Novaj alkonstruitaj moderne ekipitaj domoj enhavas la loĝoĉambrojn de la lernantoj k.c., kaj dum la konferenco ili gastigos la konferencanojn.

*2. Provizora programo.* Multaj detaloj de la konferenca programo ankoraŭ restas fiksotaj, sed la jena skizo estas nun prezentebla.

*Sabate* vespere: Inaŭguro kun elekto de prezidantaro kaj sekretario. Prelego de la prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, *H. Sonnabend,* pri la temo *Ĝis kiu grado la eksperimenta instruado de Esperanto povas helpi la enkondukon de tiu lingvo en la lernejojn de Eŭropo?* Interkona vespero.

*Dimanĉe* kaj *lunde*: Prelegserio *La lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj de Eŭropo.* Ĉiu prelego daŭros 45 minutojn kun posta 15-minuta diskuto. Je la fino de la serio estos ĝenerala diskuto.

La prelegantoj kaj iliaj temoj estos:

Prof. d-ro *Ivo Lapenna,* Universitato de Londono,
*Enkonduko pri la ĉeftemo.*

Eksterord. prof. d-ro *F. Pennacchietti,* Universitato de Venecio,
*La internacieco de Esperanto kaj la karaktero de la hind-eŭropaj elementoj en ĝi.*

Sekciestro, dipl. matematikisto, *H. D. Maas,* Universitato de Saarbrücken,
*Ĉu komputero povas helpi al solvado de la lingva problemo en Eŭropo?*

Prof. d-ro *F. Hœrburger,* Universitato de Regensburg, kaj
Doc. *Birthe Trærup,* Universitato de Kopenhago,
*Internacieco kaj nacieco en lingvo kaj muziko.*

Prof. *G. Waringhien,* Prezidanto de la Akademio de Esperanto, principe promesis prelegi, se liaj personaj cirkonstancoj tion ebligos.

*Dimanĉe* ankaŭ kunveno de *Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj* kaj *lunde* vespere balo.

*Marde:* Ĝenerala diskuto pri *Ideaj aspektoj de la esperantismo en la lumo de la aktuala krizo en la Esperanto-movado* post koncizaj enkondukaj raportoj de *J. Thierry* (Etikaj valoroj de la esperantismo) kaj *Ivo Lapenna* (Esperanto — ĉu nur instrumento de komunikado, disigebla de Humaneca Internaciismo?). — Kunveno de membroj de la *Akademio.*

*Merkrede* kaj *ĵaŭde:* Ĝeneralaj kunvenoj pri la *Organizaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado* kun jenaj eroj: Situacio de la revuo *Horizonto* (Inés Gastón), Agadgrupoj (Peter Zacho), Publikaj rilatoj (André Bourdeaux), Harmoniigo de la agadoj en Eŭropo, 4-a Internacia Konferenco de la NEM. — Gvidata vizito al la muzeo de moderna arto, *Louisiana,* en Humlebæk.

*Vendrede:* Ekskurso al Elsinoro kun gvidata vizito al la mondfama kastelo *Kronborg.*

*Sabate* antaŭtagmeze: Fermo de la konferenco.

Antaŭvidata estas ankaŭ *junulara kunveno* en la komenco de la semajno.

*3. Kotizoj.* Post la 1-a de januaro 1977 la konferencaj kotizoj plialtiĝis. Vidu la duan kolonon de la kotiza tabelo en la *Aliĝilo* enmetita en tiun ĉi numeron de *Horizonto.*

*4. Loĝigo.* En la altlernejo estas unu — kaj dulitaj ĉambroj, kaj la prezo de la restado dum la konferenca semajno estas la sama por lito en unulita ĉambro kiel por lito en dulita ĉambro, 980 dkr. inkl. aldonvaloran imposton. Pliajn informojn oni trovas en la aliĝilo, tamen ne jenan novan: ke por *infanoj ĝis 10-jaraj* la prezo estas la duona, 490 dkr. (minimuma antaŭ = pago 75 dkr.). — Dezirante vegetarajn manĝaĵojn, oni bonvolu noti tion sur la aliĝilo.

*5. Aliĝo.* Ne hezitu sendi la aliĝilon kaj samtempan pagon al la supre indikita korespondadreso, kaj nepre rapidu, se vi volas certigi al vi unulitan ĉambron, ĉar tiaj estas malmultaj.